

La Brita Esperantisto

Incorporating *ESPERANTO NEWS*

Novembro–Decembro 1993

The image shows a collage of posters and advertisements from London. At the top, there are two identical posters for 'FUN FAIR' at 'BATTERSEA PARK'. The posters are dated 'TUES 4 AUG' and 'AUG UNTIL FURTHER NOTICE'. They include the text 'OPEN DAILY 12 NOON TO 6 PM' and 'WLTW' with a logo. Below these are two more posters for 'THE Stan' magazine, dated 'March 1993'. The magazine cover features the title 'THE Stan' in a stylized font and a 'EXCLUSIVE' badge. Below the magazine covers is a large advertisement for the record 'LOVE IS THE ANSWER' by 'THE SINGLE'. The text reads: 'Available now on the following formats: 7" Single • 12" Single • Cassette Single • CD Single'. To the left of the main advertisement, there is a poster for 'The Night Tour' on '10th August', featuring a silhouette of a hand and the text 'OR HELL'. At the bottom left, there is a small poster for 'The Night Tour' with details about the event, including the date '10th August' and the location 'The Night Tour'.

Anonc-aĵo sur la stratoj de Londono. Espereble la disko furore disvendigis!

LA BRITA ESPERANTISTO

Novembro–Decembro 1993
89a jaro, N-ro 916

Eldonaĵo de
ESPERANTO-ASOCIO
DE BRITIO
140 Holland Park Avenue
London W11 4UF
Tel: 071 727 7821

Ĉefredaktoro:
WILLIAM AULD
20 Harviestoun Road, DOLLAR,
SKOTLANDO FK14 7HG.
Telekopiilo/Fax: (0259) 742860

The annual subscription to EAB
– start in any month –
is £14.00 (£7.00 if under eighteen)
Alilandanoj/Bibliotekoj £12.00

Full Members receive *La Brita Esperantisto* six times per annum.

Correspondence courses and examinations are available. Write for details and prices, with medium SAE, to Esperanto Centre, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF.

Advertisements/Reklamoj
£24 per full page/tutpaĝa. Fractions pro rata/samtarife (plus 15%).
Small Announcements/Anoncetoj
10p per word/por ĉiu vorto
minimum £2.00

**Last day for contributions to the next issue/
Limdato por la venonta numero:
20 Novembro 1993**

Typeset by Roger Booth Associates
Newcastle upon Tyne – (091) 232 8301

Printed by The Print House
North Shields – (091) 258 7027

UK ISSN 0007-067X

ENHAVO / CONTENTS

90 jarojn poste	187	The Esperanto Phenomenon	197
Universitata kurso	187	Multetna lando	198
Pligrandigi la membraron	188	Komika skeĉo: Amasa murdo ...	199
La 33a esperanta somerlemejo ..	189	Stipendioj por junaj geaktoroj ...	200
Seminario pri publiko	189	Dates worth noting	201
Pretigo de nova manlibro	190	International News	202
Brita kongreso en 1995	190	Traduku!	205
Problemo de prononcado?	191	Not guilty	207
Nova prezidanto por ILEI	192	Novaj libroj	208
Solvo de krucvorteniĝmo	192	Laŭ mia opinio	211
Ĉu kasedo aŭ gazeto?	193	Official notices	217
Lingvaj notetoj	194	Anoncetoj	219
Radio: No island is an island	196	Lazaro	220

90 JAROJN POSTE THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

No. 1.

NOVEMBRO, 1903.

[Subscription, 8s. Per Annum.]
[Single Copies, 4d.]

En la jaro 1903, kiam ankoraŭ ne ekzistis landa organizaĵo Esperantista en Britujo, la Esperanta Klubo en Londono komencis eldoni monatan gazeton kun la titolo THE ESPERANTIST, kies ĉefredaktoro estis la fama pioniro H. Bolingbroke Mudie. La unua numero aperis en novembro de tiu jaro kaj enhavis inaŭguran artikolon de W.T. Stead, ĉefredaktoro de REVIEW OF REVIEWS, presitan Esperante kaj angle. Tiu gazeto aperadis regule ĝis la fino de 1905, dediĉante sin al la tutlanda movado.

Intertempe en 1904, pro la iniciato de gvidanto de la Londona Klubo, fondiĝis la Brita Esperantista Asocio, al kiu la Klubo proprvole transdonis parton de sia agado, ekzemple la librovendadon sur tutlanda kampo.

Pro kaŭzoj kaŝitaj en la pasinteco, la nova Asocio ne transprenis la ekzistantan gazeton, sed fondis novan, propran, THE BRITISH ESPERANTIST, kies unua numero aperis en januaro 1905. Sekve dum tiu jaro aperadis du gazetoj samformataj kaj kun simila enhavo. Tiu duobleco malaperis en januaro 1906, kiam THE ESPERANTIST ĉesis aparte aperadi, kaj enkorpiĝis en THE B.E.

Tiel do komenciĝis la historio de nia revuo. Kvankam ĝian 90-jariĝon ni festos nur en januaro 1995, indas tamen repensi al ĝia antaŭirinto, la unua brita gazeto en Esperanto, la komenciĝo de 90-jara seninterrompa, malgraŭ krizoj kaj mondmilitoj, agado en kaj por Esperanto en nia lando.

Ĉu eble la fondintaj pioniroj, se ili povus reveni, surpriziĝus aŭ seniluziiĝus pro la fakto, ke nia lingvo ankoraŭ ne iĝis ĝenerale akceptita? Ni ne scias. Sed ni, kaj ankaŭ ili, pro la tempopaso jam havas abundan pruvon kaj amasan atestaĵon pri la vivkapablo de Esperanto. Ĝi montriĝis, kontraste al Volapük, ne io efemera, sinkonta kiel flagrinta artfajraĵo, sed io verva kaj konstanta, kiu plenumas jam gravan rolon kaj nur atendas sian momenton.

Estas konvene, ke ni meditu almenaŭ mallonge pri la radikoj de nia tradicio kaj pri la momento antaŭ 90 jaroj, kiam oni kuraĝe lanĉis la gazeton THE ESPERANTIST.

La Redaktoro

UNIVERSITATA KURSO

La Universitato de Edinburgo okazigos ĉi-aŭtune kurson pri 'Esperanto and International Languages'. La naŭsemajna vesperkurso estas parto de la programo de ĝia Centre for Continuing Education.

La kurso, kiun gvidos loka esperantisto Ed Robertson estos ĉefe enkonduko al la lingvo por komencantoj, sed aliaj temoj traktotaj estas la historio de la E-movado, nia literaturo, la problemoj de multlingveco, kaj lingvistikaj aspektoj de planlingvoj ĝenerale.

PLIGRANDIGI – EĈ DUOBLIGI – LA MEMBRARON: UNUAJ PAŜOJ

Kiam, dum la ĉi-jara Brita Kongreso en Hamilton, mi akceptis la oficon de Prezidanto, mi promesis labori ĉefe al du celoj: duobligi la membraron kaj batali kontraŭ la malpermeso, instrui Esperanton en mezlernejoj kiel bazan studobjekton en la nacia programo. La ĉeestantoj aplaŭdis; mi sugestis ke oni atendigu la aplaŭdon ĝis post mi faris ion!

Tiam mi diris ke mi mem tute ne povos fari iun el tiuj du taskoj, kaj ke mi ne invitas, ne petas, tamen postulas la helpon de ĉiu membro, kaj je tia helpo mi kalkulas.

Nun mi klarigu al vi, kie komenci: ne per kampanjo instrui la lingvon al novaj Esperantistoj, tamen per varbado de *jam ekzistantaj*. Estas tre ĝene, devi respondi al la demando, kiom da membroj havas EAB, per 'preskaŭ mil', sciante ke dua milo da uzantoj de la lingvo ekzistas en la lando! Do, se ĉiu nuna membro varbus *unu solan* novan membron inter eksaj aŭ ĝis-nun-nemembroj, nia unua celo estus atingita, kaj ni povus koncentriĝi je la dua, la pli malfacila.

Ĉu eblas? Ni invitis ĉiun membron akiri 20–40 subskribojn al nia peticio; unu membro akiris milon da subskriboj, tamen la sumo da subskriboj restas ege malpli ol la celita 30–40 mil. Do ĉu mi estas tute naiva, pensi ke *ĉiu membro* povas kaj pretos varbi pluan membron? Multaj diros, ke jes. Tamen ĉu *VI* estas preta helpi min pruvi ke tiuj dubantoj malpravas? Ĉu *VI* faros vian plejebilon, ebligis al mi raporti, frue en 94, ke jam estis granda kresko en la membraro? Tion mi forte esperas! Dum ni havas malpli ol mil membroj ni ne povas atendi, ke ĉi tiu registaro traktu nin serioze en la batalo pri la studprogramo (tamen, mi komencis – per letero al John Major – vi aŭdos poste pri tio).

Do, se vi konas eksajn membrojn, aŭ Esperantistojn ne-membrojn de EAB, komencu tuj la varbadon; kiel mi diris, mi kalkulas je vi! Kaj se hazarde vi iel legas ĉi-tiun kaj MEM ne estas membro, aŭ aliĝu tuj, aŭ almenaŭ skribu al mi por klarigi kial ne! Mi antaŭdankas al ĉiu pro via reago.

SKT

GRUPOJ ATENTU !!!

Finiĝis denove la jaro. Tio okazas ĉe la fino de ĉiu oktobro kiel vi scias. Almenaŭ por EAB. Viaj Grupraportoj estas bezonataj de federaciaj sekretarioj por ke ili frue faru *sian* ĉiujaran raporton, por ke mi, via nacia sekretario, faru la nacian jarraporton.

Mi petas vin sekretarioj sendu viajn fruajn raportojn al la Fed. Sek. baldaŭ por ebligis tre bonan raporton de la tuta movado en Britio. La Fed. Sek. certe sendos la Fed. raporton frue!

(Fed. raportoj atingu la Esp. Cent. en decembro!)

LA 33-A ESPERANTA SOMERLERNEJO

Inter la 30 kursanoj kiuj partoprenis la 1993 Barlastonan someran kursaron troviĝis kursanoj el kvin fremdaj landoj. Pro tio, la Kolegio havis veran internacian etoson.

D-ro Paul Gubbins denove bonege direktis la kursaron, kaj, kiel kutime, troviĝis tri studgrupoj. Kvin el la altnivelaj grupanoj ekzameniĝis laŭ la ILEI ekzameno (Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj) kaj sukcesis. La ekzamenistoj estis d-ro Marjorie Boulton kaj d-ro Georgo Kamaĉo.

Elstaraj punktoj de la semajno estis prelegoj de Georgo, la unua demandis: "Ĉu verki aŭ ne verki ... esperantlingve?", kaj, dum la diskuto Georgo listigis, laŭ li, la dek plej bonajn originalajn esperantajn verkojn. El la dek, li elektis aparte elstarajn:

La Granda Kaldrono	de John Francis
La litomiŝla Tombejo	de K. Piĉ
Sed Nur Fragmento	de Trevor Steele

Georgo ankaŭ prelegis pri rokmuzikaj grupoj kaj aliaj kantoj.

Je la 10-a de aŭgusto la kursanoj veturis al Stoke-on-Trent por la ĉiujara girlanda ceremonio honore de Zamenhof ĉe la drinkejo 'La Verda Stelo'.

Poste Tim Carr prelegis pri la erotikaj poezioj de Kalocsay: 'Sekretaj Sonetoj', kaj d-ro Marjorie Boulton, antaŭa direktoro de la Barlastonaj Someraj Kursoj, paroladis pri la granda reto de katamantoj tra la Esperanta Mondo.

Distraĵo dum la plejlasta vespero inkluzivis erojn de kuba gitaristo, nederlanda pianludanto kaj geaktoroj el Pollando, Francio kaj Hispanio.

Venontjaron okazos kvar esperantaj aferoj ĉe la kolegio – ĝis Barlastono en 1994!

W.H. Simcock

SEMINARIO PRI PUBLICO

Okazigis Will Green seminarion pri publico la 11-an Septembro. Ĉeestis 17 personoj entute. Arnold Pitt konsilis pri prelegado kaj Paul Gubbins pri surstrata kontakto kun la publiko kaj uzo de folietoj. Don Lord sprite parolis pri siaj spertoj kun intervjuistoj, aparte nesimpatiaj.

Meztage bela vetero kuraĝigis nin fronti la publikon en la ĉefa butikejo de Rugby – eĉ provi uzi la laŭparolilon. Posttagmeze tiuj, kiuj volis, provprelegis mallonge kaj kritikis unu la alian.

Kelkaj ideoj restas en mia cerbo: en folieto aŭ surstrate, ĉiam menciu la vorton 'Esperanto'; ne malŝparu tempon pri homoj kiuj nur volas argumenti sed liberigu vin afable; pri folietoj, ne indas pli da teksto ol oni povas legi inter la ĉefpordo de domo kaj ĝia fatrasujo; pri prelegado, preparu per malstreĉiĝo kaj memoru interpunkcii prelegon per paŭzoj. Mi konstatis ankaŭ ke tio, kion oni komprenas teorie, ne realiĝas sen ekzercado!

Norah Brown

PRETIGO DE NOVA MANLIBRO

Ĉiujn kelkajn jarojn pretiĝas nova manlibro, kiu enhavas la nomojn de ĉiuj reprezentantoj de EAB tra Britio kaj eksterlande. Kio estas la respondecoj de niaj lokaj reprezentantoj? Mi citu el la koncerna paĝo en la nuna numero de ĝi: 'La ĉefa devo estas: daŭre resti informita pri la movado kaj ĉiu loka aktiveco, por respondi al informpetoj. Laŭeble ankaŭ, loka reprezentanto zorgu ke okazu loka publiko – ekzemple, ke estu stoko da 'FPC' lecionoj en lokaj bibliotekoj kaj ke ie estu reklamafiŝoj (precipe je 'Esperanto Day') ... La tasko de reprezentanto neniel estas peza. La devo estas malgranda, tamen entuziasmulo povas fari preskaŭ senliman agadon.'

Esperable tio klarigas pri kion faras reprezentanto. Mi kaptu la okazon danki al tiuj niaj membroj, kiuj jam plenumas tiajn taskojn; samtempe mi instigu al niaj aliaj membroj pripensi ĉu ili ankaŭ pretus helpi la movadon per reprezentantiĝo. Se vi ja deziras tion fari, bv. skribi al la koncerno, Peter Danning, ĉe la oficejo en Londono.

Ni ankaŭ esperas ke la nova manlibro enhavos liston de lokaj grupoj (kun adreso de kontakto en la urbo/regiono); do se vi estas la nova sekretario de tia grupo, bv. ankaŭ skribi al Peter pri tio.

Geoffrey Greatrex

BRITA KONGRESO EN 1995 EN ... PARIZO?

Apenaŭ kredebla, vi diros. Sed kial ne? Mi klarigu la fonon de ĉi tiu propono mia. En 1995, ĉirkaŭ la tempo de pentekosto, okazos kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) en Parizo. EEU ampleksas ĉiujn landajn asociojn en la Eŭropa Komunumo (EK), kaj strebas kunligi ilin por antaŭenigi Esperanton en la Komunumo.

Ĉiujn tri jarojn EEU klopodas aranĝi kongreson en kiu partoprenas la 12 landaj asocioj de la EK. Pasintjare ĝi okazis en Verono, Italio, kaj en tiu urbo okazis ne nur la itala kongreso, sed ankaŭ la franca; kaj preskaŭ ĉiuj EK landoj (kaj ne nur ili) reprezentantiĝis. En Parizo en 1995 ne nur la francoj do havos sian nacian kongreson – la italoj kaj germanoj same faros, kaj eble la hispanoj. Britio ne tiom foras de Francio – kaj eĉ pli apudus tiam, post la finkonstruo (se tio okazos!) de la tunelo – do mi proponas ke EAB rezignu pri nacia kongreso en Britio tiun jaron, kaj anstataŭe okazigu ĝin en Parizo. Tio estos bona elmonro de nia eŭropeco kaj samtempe pli gravigos la kongreson; cetere, laŭdire, Parizo en printempo ne estas tiom malplaĉa loko.

Mi atendas viajn reagojn, kaj kompreneble necesos diskuti la proponon dum la venonta brita kongreso. Mi tamen klarigu ke mi antaŭvidas ke nia jarkunveno NE okazos en Parizo: ĝi prefere okazus je alia dato ie en Britio, por ke tiuj, kiuj ne povos iri al Francio, ja havu la okazon partopreni ĝin.

Cetere, por tiuj, kiuj deziras pli da informoj pri kio okazas pri Esperanto en la Eŭropa Komunumo, mi kaptu la okazon rekomendi al vi la revuon, *Eŭropa*

Esperantisto, redaktatan de Edmund Grimley Evans (£2 por unujara abono – 4 numeroj); por informo, bv. skribi al S-ro K. Jagdis, First Floor Flat, 27 Montpelier Street, Brighton BN1 3DL.

La Administra Komitato, dum kunsido la 18an de septembro, decidis ne subteni ĉi tiun proponon. Sed finfine tiaj decidoj estas en la manoj de niaj membroj: bv do respondi al mi (ĉe la Londona oficejo) se vi subtenas aŭ kontraŭas parizan kongreson de EAB.

Geoffrey Greatrex, Prezidanto de EEU

PROBLEMO DE PRONONCADO?

Tre ofte la angle-parolantaj Esperantistoj, ne nur la komencantoj sed tro ofte spertuloj, mispronocas la frazon *MI NE SCIAS*. Tiu simpla frazeto ofte eliras la lipojn kiel *MI NE SIAS* aŭ *MI NE CIAS*. Kaj multfoje mi aŭdis la plendon “Sed mi tute ne povas eldiri tiun STS sonon!”

Malprave. Mi ne akceptas tion. Fakte, kiam mi instruas, mi frue en la kurso, antaŭ ol prezenti la literon C, donas ekzercojn, kiujn la lernantoj ne rekonas kiel insidojn. Mi serĉas (mi diras) iujn klarparolantojn por speciala leciono. Tiam mi prezentas plurajn **anglalingvajn** frazojn kaj insistas ke ĉiu lernanto legu ilin voĉe, klare, elegante.

Jen kelkaj:

The east sea is rough but the west seems rougher

The complaint was most serious

Why was the mast sawn off?

People on the coast saw the wreck.

The best seats are dearer.

I took the first set and the last set.

Plant only the newest seeds.

Fine mi prezentas la frazon:

DON'T LET THE BIRD IN THE NEST SEE US

en kiu la lastaj tri vortoj NEST SEE US havas preskaŭ identajn sonojn kiel NE SCIAS. (nordangle = NE SCIOS?).

Prezentinte la literon C, poste kiel ekzercojn mi prezentas plurajn frazojn en Esperanto kiujn ĉiu devas legi voĉe. Ekzemple:

Mi estas certa. Ŝi posedas cignon. Mi ne legas cirkulerojn. Ni devas celi alte.

Li desegnis cirklon. Mi havas centojn. En tiuj frazoj mi apartigis la S kaj C.

Post tiu trompada ekzerco, mi havas malmultan proteston.

Mi nur laste prezentas tiun frazeton *MI NE SCIAS*.

Post tio mi insistas pri perfektaj SCIENCO. KONSCIO, ESCEPTO, KONSCIENCO, MISCITI kaj bruligas la orelojn de pekintoj!

W.G.

NOVA PREZIDANTO POR ILEI

La instruista ligo pluiras post sia 27a Konferenco sub la gvido de nova prezidanto, d-ro Duncan Charters, profesoro pri fremdlingva instruado en Kolegio Principia en Ilinojso, Usono.

Antaŭ la komitatanoj li prezentis sian vizion por la nova periodo: stimuli la instruistan trejnadon, eldoni pli da novtipaj instruiloj, inkluzive de vidbenda kurso, kaj jungi la plurajn sed disajn unuopajn fakulojn en precipe sed ne nur usonaj universitatoj al kohera kunlaboro kadre de ILEI.

D-ro Charters iĝis konata al la partoprenantoj de la UK en Valencio pro la gvidado de la kongresa temo 'Klerigo por la 21a jarcento'; en la konferenco li same gvidis la fakan temon pri instruista trejnado. Post fruktodonaj metodikaj diskutoj, interalie pri la kultura enhavo de nia instruado, oni formulis konkretajn planojn por 1994 laŭ kiuj estos ofertataj kursoj en Eŭropo kaj en la Ŝtata Universitato de San Francisko.

La komitato de ILEI plie akceptis du novajn landajn sekciojn, en Kubo kaj Albanio, kaj nomis novan honoran membron, s-ino Doroteo Holland-Kaupp. La cetera konsisto de la estraro restis senŝanĝa.

La konferenco altiris 48 partoprenantojn el eŭropaj landoj kaj plie Kubo, Koreio, Israelo, Usono kaj Aŭstralio. Tiujn suplementis refreŝige deko da junuloj inter 13- kaj 16-jaraj el ok landoj, kiuj partoprenis la 2an Gimnazion de ILEI sub gvido de s-inoj Szödy kaj Makay el la pedagogia branĉo de la E-fako de la Universitato ELTE en Budapeŝto. La konferencanoj sekve povis sperti model-lecionojn pri E-literaturo (Bacev), hispana lingvo komunikometode (Charters), geografio de imag-lando (MacGill), bio-kemio (Bojaĝieva), matematiko (Makaj) kaj sub-atoma fiziko (Christopher Hooley, mem gimnaziano).

D-ro So Ĵin Su klarigis la preparojn por la venonta konferenco kaj montris fotojn de la enmontara konferencujo 40 km. for de Seŭlo, vokanta por bunta, multnacia partopreno.

La tuta konferenco disvolviĝis en studenta hejmo, rande de Valencio, Hispanio, en tre agrablaj klimataj kondiĉoj.

SMG

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO (p.160)

Horizontale:

1. Apartamentaro; 8. Bue; 9. Bis; 10. Sider; 11. Troti; 13. Elitr; 15. Noa; 17. Adapti; 18. Pacema (aŭ Pacama); 19. Tpr; 21. Idola; 24. Kobro; 26. Morna; 27. Nei; 28. Tri; 29. Orikteropinoj.

Vertikale:

1. Arbitracianto; 2. Aveno; 3. Teksi; 4. Melduo; 5. Nepre; 6. Ambli; 7. Observatorioj; 12. Tipol (aŭ Tipul); 14. Liceo; 15. Nit; 16. Apr; 20. Purpur; 22. Ofici; 23. Omlet; 24. Kanap; 25. Buton.

Du premietoj estis lotumitaj inter sendintoj de la ĝustaj solvoj.
Ilin gajnis W. Walker kaj W. Simcock. Gratulon!

ĈU KASEDO AŬ GAZETO?

Estas interese aŭdi la argumentojn de esperantistoj. Ili parolas senĉese pri la gramatiko de Esperanto. Ili fanfaronas pri ĝia simpla strukturo, pri ĝia logiko, pri ĝia facileco. Eble ja Esperanto estas relative pli facila sed...

Mi ofte ridas, kiam mi aŭdas la jenon. "Tiu, kiu diskutas aŭ negocas ne en la gepatra lingvo havas malavantaĝon!" Do, la solvo laŭ la argumentoj de la esperantistoj estas tre simpla. Ni ĉiuj lernu novan lingvon, neniu parolu sian gepatran lingvon en internacia komunikado, kaj ni ĉiuj spertu la samajn malavantaĝojn! Ĉu tio fakte estas la solvo, kiun ni celas?

Tridek jarojn mi lernas Esperanton. Komence ŝajnis al mi, ke la gramatiko estas simpla kaj logika sed nun mi ne estas tro certa. Tamen alia aspekto de nia lingvo pli malkvietigas min. Tio rilatas kaj la esprim-manieron kaj la prononcon. Mi serioze komencas timi, ke la nenacia karaktero de nia lingvo prezentas siajn problemojn. Kiam mi lernas fremdan lingvon, mi devas akcepti novajn idiotismojn kaj mi devas kiel eble plej bone imiti la prononcon de la parolantoj de tiu lingvo. Frazfarado sekvos aliajn regulojn ol en mia gepatra lingvo. Mi devos lerni alian verbosistemon ktp. Kiam mi ion ne komprenos, mi povos konsiliĝi ĉe tiuj, kies lingvon mi klopodas lerni. Kaj se mi lernas Esperanton? Kiu min konsilos? Kies prononcon mi strebu imiti?

Mi pripensis tiujn demandojn jam longe. Mi laboris preskaŭ dek jarojn en Prago kaj aktivis en la tiea klubo. Mi al kutimiĝis al ĉeĥa esperanto! Al Prago veturas multe da germanoj. Miaj unuaj kontaktoj kun ili ŝokis min. Apenaŭ mi komprenis ilin. Turisto el Lejpcigo volis min demandi pri io. Je la tria ripeto mi ekkaptis la komencon de la demando. "Ĝu fi phone khonas la obon?" Praga samideano pli sperta interpretis: "Ĉu vi bone konas la urbon?"! La prononco tiel similis al la germana, ke mi tre malfacile distingis, ĉu la gastoj krokodilas, ĉu ili parolas verde! Venis francoj ... denove problemoj. Kaj por mi la plej granda ŝoko! Aperis jorkŝirano. La unuaj silaboj elbuŝigitaj de li klare montris de kie li estas. Lin la praganoj ne komprenis!

Mi havis okazon labori dum tri jaroj en Ĉinujo. Ankaŭ tie inter esperantistoj mi ofte bezonis interpretiston! Mi memoras, kiel unu mian kolegon, instruiston de Esperanto, mi kolerigis per mia insistado, ke mi havas nenian kasedon por prunti al li! Li deziris legi mian gazeton! En Pekino dum internacia konferenco mi distris min ... mi divenis el kiu lando estas kiu esperantisto laŭ ties prononco. Svisa radio ĉesigis siajn esperantajn disaŭdigojn. Sed vi certe memoras ilin, ĉu? Kiel facile ekscii, kiu parolas hejme la germanan kaj kiu la francan! Kaj aŭskultu foje Vienon! Ne ĉiu kapablas bone lerni lingvojn. Sed se la x-eska prononcmankado malhelpas kompreniĝon, ĉu ni ion solvas per la aserto, ke ni ĉiuj parolas la saman lingvon? Ke ni posedas facilan kaj neŭtralan lingvon?

Richard Howard

LINGVAJ NOTETOJ

E.T. Grimley Evans

Jen kelkaj ofte misuzataj vortoj. La vortoj en ĉiu paro ne estas sinonimoj!

asisti/helpi

'Asisti' signifas: 'helpi, aŭ helpe ĉeesti, pro ofica devo aŭ oficiala funkcio'. Laŭ mia lingvosento komputilo ne povas asisti, ĉar komputilo ne povas havi oficon. Do pli bone estas paroli pri 'komputile helpata desegno', ekzemple.

ekzakta/preciza

'Ekzakta' signifas: 'science ĝusta kaj severe preciza'. 'Preciza' signifas: 'ĝuste kaj klare difinita'. 'Preciza' estas tre baza ideo, malfacile difinebla per pli simplaj vortoj. 'Ekzakta' estas kelkfoje anstataŭebla per 'striкта', 'rigora', eĉ pedanta. Oni parolas do pri ekzakta difino kaj ekzaktaj sciencoj, sed pri preciza horloĝo kaj preciza adreso de iu. Oni preskaŭ neniam bezonas la adverbon 'ekzakte'; se oni vidas tiun vorton, preskaŭ ĉiam ĝi estas erare uzata anstataŭ 'precize'. Jen kelkaj ekzemploj de ĝusta uzado:

Ĉio okazis precize tiel, kiel mi antaŭvidis.

Kie ĝi estas precize?

Mi ankoraŭ ne scias precize, kiam mi ekveturos.

kompleksa/komplika

'Kompleksa' signifas: 'enhavanta en si plurajn malsamajn elementojn'. 'Komplika' signifas: 'embarase

malsimpla'. Oni parolas do pri kompleksaj verbotempoj, kompleksaj nombroj, kompleksaj demandoj, sed (normale) pri komplikaj problemoj, komplikaj aparatoj, komplikaj planoj. Notu, ke 'kompliki' estas verbo signifanta proksimume 'malfaciligi per tro da elementoj', sed ke oni nur diras 'komplikita', se vere estas okazinta ia ago de komplikado.

direkte/rekte

'Direkti' signifas: 'gvidi, turni al celo, irigi laŭ la ĝusta vojo, stiri'. 'Direkte' signifas do: 'en gvida maniero'. Malofte oni bezonas tiun adverbon. 'Rekta' signifas: 'konservanta sian direkton; seninterrompa; senpera; vertikala; orta'. 'Rekte' signifas do: 'laŭ la plej mallonga linio; senpere'. La adverbo uziĝas oftege. Jen kelkaj ekzemploj:

Kuri rekte al la celo.

Mi tion diris al li tute rekte.

Mi pensas kaj skribas rekte en E-o.

kolono/kolumno

Kolono estas parto de Greka templo, ekzemple. Kolumno estas vertikala dividaĵo de paĝo, aŭ vico de soldatoj, ekzemple. (Kaj kolumo estas parto de ĉemizo!)

ekonomiko/ekonomio

'Ekonomiko' estas la scienco pri la meĥanismoj de produktado kaj distribuado. 'Ekonomika' signifas 'rilata al ekonomiko (la scienco)'.

'Ekonomio' estas 'sistema kaj ŝparema ordo en administrado', atingo de celo per plej efikaj rimedoj', aŭ 'situacio de institucio el vidpunkto de riĉeco'. Do 'ekonomia' povas signifi 'rilata al la ekonomia situacio', au 'efika, ŝparema'. Ekzemploj:

La ekonomikaj teorioj de S-ino Thatcher.

La ekonomia metodo solvi nian problemon.

La ekonomia situacio de la lando.

eldoni/elmeti

Kunmetitaj vortoj en E-o estas preskaŭ ĉiam sufiĉe logikaj, por ke oni povu tuj kompreni ilin en kunteksto, se oni nur konas la elementojn. Sed multaj kunmetitaj vortoj jam akiris pli precizan signifon nekalkuleblan per la 'sumo de la elementoj', kaj por mem ĝuste uzi tiujn vortojn, oni devas ilin koni. (Se ne estus tiel, au ni havus primitivan lingvon nekapablan ĉion esprimi, aŭ ni havus lingvon multe malpli facilan, ĉar oni bezonus multe pli da bazaj radikoj.) La vortoj 'eldoni' kaj 'elmeti' donas bonegan ekzemplon de la fenomeno.

'Eldoni' (preskaŭ ĉiam) signifas 'publikigi kaj disvendi libron'. Do 'eldono' signifas aron de identaj libroj: 'unua eldono', 'dua eldono', 'lukse bindita eldono', ktp.

La verbo 'elmeti' uziĝas en pluraj sencoj. Unu el ili estas 'prezenti al vido'. Komputiloj emmetas kaj elmetas siajn datenojn, do oni povas paroli pri la elmet(a)ĵo de komputilo-programo. Alia uziĝo de 'elmeti' estas en la senco 'lasi senŝirme': 'Ni ne elmetu nin al la danĝero, ke...'. Vidu en PIV por aliaj uzekzemploj.

En Vieno mi observis interesan aferon: iu germana Esperantisto duobligis la prefikson 'mal' por emfazi la malecon. Se mi ĝuste memoras, la vorto estis 'mal-mal-multekosta', kun la signifo ne de 'multekosta' sed de 'tre malmultekosta'. Tiu unuopa observo eble havas semantikajn sekvojn. Mi ja neniam memoras okazon, en kiu parolanto spontane kaj neludeme duobligis la prefikson 'mal-' en la 'logika' senco, laŭ kiu la du maloj nuligas sin reciproke. Tian uzadon ni vidis plejparte nur en la malsprita mokado de neologismuloj.



Regulo 10 de la Fundamenta Gramatiko: La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo. Jen kialo, ke oni skribu la nombrojn de 11 ĝis 19 kiel du apartajn vortojn, krom tio, ke en la Fundamenta Ekzercaro (#12), oni legas, ke kvin kaj sep faras 'dek du'. Oni ja ne prononcas ĝin kiel unuvortan ordonon 'dekdu!', kvankam oni ja diras kaj skribas 'dekdua' (kun la ritmo de 'detrua').



PIV donas 'intertempe' kiel la unuan signifon de la Zamenhofs vorto 'dume', tiel klarigante rusion (komparu 'poka') per francismo (komparu 'entre-temps'). Ĉu Zamenhofs tamen iam uzis la vorton 'intertempe'? Por respondi tiajn demandojn estus utile havi lian plenan verkaron enkomputiligita.



RADIO: NO ISLAND IS AN ISLAND

The Esperanto section is back in the latest leaflet of Radio Vatican; the evening Esperanto transmissions are now also on satellite* and there will be six extra broadcasts in December and January – on the evenings of 8th, 24th, 25th & 31st December and 1st & 6th January.

The following table is almost entirely owing to the work of Josef Lechermeier, which is much appreciated.

The frequencies in heavy type are 'best bets' for UK and Irish Republic listeners.

<u>DAY</u>	<u>TIME (GMT)</u>	<u>STATION</u>	<u>FREQUENCIES IN KHZ</u> <u>(medium wave wave-</u> <u>lengths in brackets)</u>
Daily	03.30–04.00	R. Bandeirantes	11925
Sunday	04.05–04.30	R. Aŭstrio	6155, 13730 , 15410
Thursday	06.10–06.24	R. Vatikano	6185, 7365
last Sat. of month	06.30–07.00	R. Vilnius	9710
Sunday	07.00–07.30	R. Havano	9550, 6060
Daily	11.00–11.25	R. Ĉinio Internacia	6955, 9480
Daily	13.00–13.25	R. Ĉinio Internacia	11650, 11840
Sunday	13.05–13.30	R. Aŭstrio	6155, 13730 , 15450
Daily	14.30–14.55	Pola Radio	1503 (200m) , 6095, 7145, 9525
Sunday	15.00–15.30	R. Havano	11760
Sunday	18.30–19.00	R. Havano	17705, 15165
Sunday	20.20–20.29*	R. Vatikano	1350 (196m) , 6245, 5882, 7355
Saturday	20.00–20.20	RAI, Romo	7275, 9710 , 11800
Daily	20.00–20.25	R. Ĉinio Internacia	7470, 9965 , 15370
Thursday	21.15–21.30	R. Tallinn	1035 (290m), 5925, 9560
Daily	21.30–21.55	Pola Radio	1503 (200m) , 6095 7270, 7285
Sunday	22.00–22.30	Radio Havano	17705 , 15165
Daily	22.30–22.55	R. Ĉinio Internacia	9480, 11515
Sunday	23.30–24.00	Radio Havano	11760, 11970, 13710, 9655

* Radio Vatikana per satelito EUTELSAT II-FI (13 gradoj oriente, 11.544 GHz video MBC, subportanta frekvenco 7.74 MHz (FM), horizontala polarizado) – sed ne uzata je 06.10 GMT.

The Esperanto Phenomenon (Translations from the International Language)

ORIGINAL ESPERANTO LITERATURE¹

We must realise first of all that original literature in Esperanto is a phenomenon unique in the world's history: it is artistic creation using an artificial language. Quite intentionally do I use the word artificial, for Esperanto is the one and only project for an international language that was the brainchild of an artist and not of a scientist or dilettante; and this, in my opinion, is the main reason for its success compared with the total fiasco of hundreds of other such projects. For language in its nature is emotional, not rational: innumerable people, for example, clutch on to their native tongue as though it were something unusual and special rather than one out of thousands of other languages in similar use and just as beautiful and expressive in the eyes of their users. One's language becomes a symbol of one's group, and consequently its superiority, and also, it must be recognised, of its security. Tribalism has still today left its traces in our psyches.

We must further recognise that innumerable esperantists, too, yesterday and today, have related just as emotionally towards their chosen tongue, their beloved language of peace, Esperanto, because it gives them a feeling of security, of belonging to a group greater than tribe or nation – namely, the human race. And this is not stupid, neither is it to be deplored, just as emotional feelings towards one's native tongue are not deplorable, as long as they don't become too emphatic, too immoderate. A human being can never be wholly rational or wholly logical, as he or she cannot be wholly emotional: this is made clear to us splendidly and definitively by one of Esperanto literature's masterpieces *Vojaĝo al Kazohinio* (A Voyage to Kazohinia) by Szathmári, in which the Hins are wholly rational and the Behins wholly irrational, and neither of them are totally human. Let me acknowledge clearly that esperantists, too, relate to their language emotionally, because without such an emotional link the project for an international language would never have developed into the living language of tens of thousands of enthusiasts past and present, and it would quite certainly never have spread over the whole globe as in fact it has. (If instead of trying to determine 'how many esperantists there are in the world' you ask a more significant question, 'In how many countries do you find people who speak Esperanto?', you reveal the true miracle, namely that there is practically no country in the world where there are not at least a few esperantists, since everywhere in the world, thank god, there are at least a few people with finer aspirations and wider horizons, and such people see Esperanto for what it is: the impartial international mode of expression, the natural language for use among people of different nationalities. And it is precisely this universality of our language that is our justification and the logical basis of our belief in the so-called 'final victory'.)

So emotion is a natural and not a shameful factor in our being esperantists. It is more fashionable today to call this an 'ideology', since that word seems more scientific – more objective it certainly isn't. More and more firmly we all commit ourselves ideologically to the concept of an impartial artificial language as the second language for all; and this implies, we must recognise, ideas of human equality and human rights, even if some of those who learn Esperanto are only vaguely aware of this. The very idea of Esperanto definitely awakens enthusiasm in some minds, just as it obviously turns others off – equally for ideological reasons, usually unconscious.

1. From ENKONDUKO EN LA ORIGINALAN LITERATURON DE ESPERANTO, by William Auld. Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1979. 101p.

MULTETNA LANDO

Dum la studrondo en Dunblane lastatempe, aparte interesis min diskuto enkondukita de Albert Goodheir, pri la Muzeo de St Mungo en Glasgovo. La muzeo prezentas artaĵojn de diversaj kulturoj, juda, hinda, islama, budhisma krom kristana kaj oni povas legi klarigojn pri la simbola signifo. Oni povas lerni iom pri kiamaniere la diversaj kulturoj traktas la ĉefajn sociajn aferojn de homa vivo – naskiĝon, plenkreskiĝon, geedziĝon kaj morton. Krome okazis tie apartaj ekspozicioj, ekzemple pri budhismo kaj nun pri la kredoj kaj artaĵoj de la indiĝenoj de Aŭstralio. La pentraĵo de Salvador Dali, 'La Krucumado laŭ Sankta Johano' ankaŭ troviĝas en tiu muzeo. Japana specialisto desegnis la ĝardenon laŭ la stilo de la zenaj monaĥejoj. Tiu estas bela kaj videbla de la kafejo. La konstruaĵo estas nova sed kongruas kun la najbaraj konstruaĵoj – la katedralo, du preĝejoj kaj la universitato de Glasgovo. Mi jam dufoje vizitis la muzeon, ĝuis la belaĵojn kaj trovis ĝin milde pensiga.

Britio nun estas multetna lando kaj mi kredas ke ofta kaŭzo de antaŭjuĝoj estas nescio. La muzeo donas al ni la eblecon iomete pli kompreni kaj esplori la similecojn inter niaj diversaj kulturoj – foje la ideoj estas samaj, nur la simboloj malsimilaj.

Esperantistoj multe interesiĝas pri alilandanoj kaj iliaj kulturoj sed la Esperantomondo restas ĉefe blanka kaj kristana (aŭ almenaŭ forte influita per kristanismo). Ne multaj nigraj vizaĝoj videblas ĉe niaj Britaj kongresoj malgraŭ ke loĝas ĉi tie multaj diversetnaj Britoj. Ĉu ni volas ke la movado restu tia?

Norah Brown

NI GRATULAS al nia amiko Brian Haswell pro lia kandidatiĝo en la 'Countdown' televidprogramo! Multaj homoj vidis ĝin kaj menciis ke 'iu ulo' aperis kiu parolis Esperanton kaj oni vidigis elĉerpaĵon el 'La Graveco'. Kia forta atento-kaptilo!

Ni devas kuraĝigi pli da tiaj partoprenoj en kvizprogramoj en televido kaj radio. Kiu plua sesklasano pretas pri 'Blockbusters' (jes, jam unu ĉi-jare)? Kiu parenca geparo por 'Generation Game'? Kiu al 'Brain of Britain'? Kaj kiun spertulon ni proponu kiel 'Mastermind'? (kun Esperanta temo, kompreneble?)

Ne vi? Kial ne? Eĉ via loka radio-stacio ofte invitas partoprenon en kvizoj aŭ ludoj, kaj kutime pridemandas partoprenantojn pri intereso, hobiaj ktp. Ne hezitu – amuzu vin, kaj aŭdigu la vorton 'Esperanto' en ĉiutagaj popularaj amas-medioj!

S.K. Thompson

komika skeĉo: AMASA MURDO

roluloj: sinjorino Bartólomu
Detektiv-serĝento Wilkins

(Wilkins frapas la pordon kaj S-ino Bartólomu malfermas ĝin)

- W.** Ha! Bonan matenon! Sinjorino Bartólomu?
- B.** (ĉiam histerie) Jes!
- W.** (montras identigan karton) Detektiv-serĝento Wilkins. Ĉu vi telefonis la policejon hodiaŭ matene kaj diris ke amasa murdo okazis?
- B.** Jes!
- W.** Kio precize kaŭzis vin formi ĉi tiun opinionon?
- B.** La sep kadavroj kiuj kuŝas en la apuda ĉambro!
- W.** Ha! Mi komprenas (komencas fari notojn) pardonu! ... atendu! ... nu, kiu mortis?
- B.** (ankoraŭ histerie) Mia Avo!
- W.** (skribas kvazaŭpenige) Via Avo.
- B.** Mia patro!
- W.** Via patro.
- B.** Mia onklo!
- W.** Onklo.
- B.** Miaj tri kuzoj kaj ...
- W.** Viaj tri kuzoj.
- B.** – Kaj mia edzo
- W.** Kaj via edzo ... bone ... sep kadavroj ... nu, tuŝu nenion, sinjorino ... vi komprenas, ke mi devos registri la poziciojn de la korpoj, konstati la naturojn de la vundoj ...
- B.** Mi faris tion!
- W.** Pardonon?
- B.** Mi faris tion. Mi mortigis ilin ĉiujn.
- W.** (pacience) Sinjorino Bartólomu, la laboro de policano estas plejparte banala kaj rutina, kaj, vere malofte, kiel hodiaŭ, li akiras ŝancon esplori pli gravan krimon ... malsimplan, treege ekscitantan kaj intelekte stimulantan krimon ...
- B.** Tiel ne estas necese!
- W.** (ignoras ŝin) ... kun multe da perpleksaj senelirejoj, neidentigitaj korpoj ...

- B.** Mi povas identigi ilin ĉiujn!
- W.** (ankoraŭ ignoras ŝin) ... kun ŝanco praktiki realan deduktadon (turnis sin al B) Nu, mi devos starigi multe da penetraj demandoj ... konstati la eblan motivon, la rimedon, kaj la okazon.
- B.** Nu, mi heredas iliajn monojn (el mansaketo prenas revolveron) mi uzis ĉi tiun pafilon, kaj mi loĝas ĉi tie.
- W.** (enpoŝigas la pafilon) Mi ne aŭdis tion.
- B.** (el la mansako) Mi skribis tutan konfeson.
- W.** Konfeson! Nu kion pri mia labor-kontenteco? Semajno post semajno mi pasigas horojn okupiĝante pri bagatelaj krimetoj. La esploro de amasa murdo povas kompensi tiun. Mi devas *eltiri konfesojn* per brilega malrekteco, komplika blufado kaj imaga psikologia militado.
- B.** (el la mansako) Jen la listo de la kaŭzoj.
- W.** Liston! Liston! Nekredeble! Do, kie estas la defio por mi? Se mi revenus al la policejo kaj dirus, ke mi solvis amasan murdon per la ricevo de subskribita konfeso kaj listo de la kaŭzoj – mi certe estus la mokcelo de la tuta divizio!
- B.** Nu, mi volas certigi vin, ke mi tute ne rezistos areston.
- W.** Ha! Ne! Nu, jen la fino! Estas nur unu solvo! (Li pafas ŝin kaj li komencas eliri) (Li skribas en sia notlibro) Post la eltrovo de la ... *ok* mortintaj korpoj, kaj la *kompleta foresto* de murdilo, mi pensis, ke tiu ĉi estas unu el la plej famaj krim-ekzemploj de la jarcento ... mi ekpenis eltrovi la *misterajn identecojn* de la mortintoj per kunkombino iom de la malklaraj ...

rapida kurteno

WHS

STIPENDIOJ POR JUNAJ GEAKTOROJ?

Ĉu vi interesiĝas pri dramo? Aktorado? La teatro esperanta? Ĉu vi havas malpli ol 25 jarojn? Se jes, jen bona novaĵo!

La Esperanto-Asocio de Britio finance subtenos vian partoprenadon en la teatra semajnfino ĉe Wedgwood Memorial College, Barlaston, okazonta inter la 28a kaj la 30a de januaro, 1994.

Detaloj pri la semajnfino *Ni Teatrumu!* haveblas aŭ en la pasinta numero de La Brita Esperantisto aŭ de d-ro Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG (tel. 0782 372105).

Interesatoj estas petataj kiel eble plej frue kontakti d-ron Tatton por informiĝi pri detaloj de la stipendioj. Espereble ĉiu partoprenonto sub 25 jaroj iel profitos de la helpemo kaj malavareco de EAB.

PPG

DATES WORTH NOTING - 1993/94

NOVEMBER 1993

Sat 20 - A South Midlands Federation meeting and AGM at 1.30pm in the Friends Meeting House, Watford. For further details phone Joan Dawson on 081-427 9569.

On the same date - Lou Brooks will speak about GCSE at the Eastern Federation meeting in Shenfield. Further details from Mrs Scott, 19 Potter Street, Halstead CO9 3RG.

On the same date - Teachers' and EAB Management Committees meet.

DECEMBER 1993

Sat 4 to Tues 7 - The 26th Catalan Congress and the 33rd International Floral Eisteddfod will take place in Majorca. Details from Box 290, E-08200 Sabadell, Spain.

Sun 5 - Marguerite Key will lead the service in Charminster URC, Sutton Road, Charminster, Bournemouth, at 3pm.

Fri 10 to Sun 12 - The 42nd Cultural Weekend of the Saarland Esperanto League takes place in Homburg. Write to SEL, Querstrasse 11, D-66287 Quierschied, Germany.

Sun 12 - Dr Marjorie Flint will lead the Christmas Service at 3.15pm in Hinde St Church, London W1. Christmas Tea will follow in a hall beneath the church.

Sun 19 - A Christmas Service in the Chapel of the Three Kings, Colston Street, Bristol, at 3pm.

Mon 27 - A week's international festival for those aged 25-55 and young families begins in Sensenstein (20 miles north of Cassell). Write to Hans-Dieter Platz 1148, D-34303 Niedenstein, Germany.

JANUARY 1994

Sat 15 - The Teachers' and EAB Management Committees and the Consultative Council meet.

Fri 28 to Sun 30 - Lou Brooks, 5 Park Drive, Upminster, Essex, invites you to Wedgwood College, Barlaston, to study acting in Esperanto both in theory and in practice.

FEBRUARY 1994

Fri 11 to Sun 13 - Why not attend the weekend course at **Belstead House**, Sprites Lane, Belstead, Ipswich IP8 3NA? Tel. 0473-686321.

MARCH 1994

Sat 5 - The Management Committee meets again.

On the same date - the Midland Federation has arranged an Esperanto Day at Wedgwood College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffordshire.

APRIL 1994

Good Fri 1 to Easter Mon 4 - The **British Esperanto Congress** will be at Richmond-on-Thames, and will include Annual Meetings, group Meetings, Talks, Discussions, an Easter Service and some good Entertainment.

Sat 2 to Tues 5 - An inter-faith seminar in the Czech Republic with the theme 'No future without peace between religions'. Write to Bernard Westerhoff, Ulrichstrasse 20, D-60431 Frankfurt /Main. Tel: 01049 69 519845.

Fri 15 to Sun 17 - The 89th Scottish Congress at Oatridge Agricultural College, Ecclesmachan, W. Lothian (20 miles west of Edinburgh). Write to Ron Calder, 92 Liberton Brae, Edinburgh EH16 6LB.

Continued on page 204

Spanish Nights (& Days)

The World Universal Esperanto Congress was held this summer in Valencia, Spain. There were 1864 participants from 65 countries. The difference between this and other international conferences was no language problems and no expensive and time consuming interpretation from one language to another.

Official Messages

Among the eminent individuals sending messages to the Congress in Valencia were Boutros Ghali, the General Secretary of the United Nations, Francisco Mayor, the General Secretary of UNESCO, and the Pope. All sent messages praising the work of the Congress and of Esperantists throughout the world. The Message from the Pope particularly encouraged both the organisers and participants to continue their valuable work for a world where understanding and unity were essential.

Prize Winning Radio Station

During the Congress in Valencia the Esperanto Section of Polish Radio were presented with the Onisaburo Deguchi Prize for their active and very successful use of Esperanto.

The award was inaugurated by Oomoto (a religious group in Japan) in 1987 on the 100th anniversary of the creation of Esperanto. It is awarded each year to an individual or organisation which uses Esperanto and contributes by their activities to world peace and international understanding.

Busy as Bees

The programme of the Congress in Valencia had more than 200 meetings, concerts, etc. This meant that, unfortunately, many of them occurred at the same time. For example, during the orchestral concert when a new Cantata was presented there were 16 other meetings or events taking place!

Radio Times

An amateur radio station was functioning throughout the congress manned by Esperanto speaking licensed operators. In all, more than 2000 contacts were made around the world.

Religious Times

A very well attended ecumenical service was held in Valencia Cathedral.

The Japanese religious movement Oomoto arranged meetings as did Taoists, Protestants, Spiritualists and Catholics.

Criminal Times

International conferences as large as that in Valencia unfortunately attract the attention of less desirable types. There were a number of thefts from delegates' cars but excellent work by Spanish members of the local organising committee led police to make a number of arrests and retrieve personal belongings of the delegates.

We are happy to be able to report that although Esperanto speakers come from all levels of society and represent a wide range of professions and occupations, none of those arrested could speak Esperanto.

It seems that although Esperanto has penetrated most areas of life and been accepted, the criminal fraternity have yet to realise its value! Long may this situation continue.

This is clearly one area where the police are ahead of the criminals, as the International Police Association which was formed in 1950 uses Esperanto for its motto 'Service through Friendship'.

Artistic Times

Congresses are noted for the quantity and quality of artistic presentations and events. They are too many to list, but among them were the presentation by a British group of an Alan Ayckbourn play, a presentation by a very talented Cuban performer, a piano concert by two Russian artists and, as you would expect in Spain, a concert where flamenco dancing played a major role.

Educational Times

The 46th International Congress University was outstanding with nine lectures delivered by speakers from six countries. The president was Dr John Wells of London University and among the speakers were Dr H.M. Maitzen from Vienna University, Prof. D. Charters from Illinois, Prof. Maria Rafaela Uruena of Valladolid University, Eva Bojegeva, a biochemistry lecturer at Plovdiv Medical University in Bulgaria, Miguel Fernandez Martin, a poet and translator, Dr Marjorie Boulton from Britain and Dr Margaret Furness, director of the radiological department at the Women and Children's hospital in Adelaide.

Wonderful Times

All in all, another memorable congress. It is expected that the 79th Congress to be held in Seoul, Korea, will be equally exciting and stimulating. Hopefully, many Chinese Esperantists will be able to take part due to its proximity to their homeland, so start saving now for an event that is sure to be something out of the ordinary.

For further information contact:

THE ESPERANTO CENTRE
140 Holland Park Avenue,
London W11 4UF
Tel: 071-727 7821

OR:

DATES WORTH NOTING (Cont.)

APRIL 1994 (Cont.)

Fri 22 to Sun 24 – The Quaker Esperanto Society will meet Friends from abroad at All Hallows Convent Conference Centre in Ditchingham. Contact Martin Howard 0371 850423.

On the same dates – SATEB has its annual conference in Wedgwood College, Barlaston. For details phone the Secretary of Workers' Esperanto Movement: 0602 208156.

MAY 1994

Fri 13 to Fri 20 – A Railway Congress in Krems on the Danube. Contact IFEF Congress, 3101 St Polten, Box 194, Austria.

Fri 20 to Mon 23 – The German Esperanto Congress in Kiel. Write to Dr Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Strasse 2a, D-8356 Nordwalde, Germany.

JUNE 1994

Teachers' and Management Committees meet at 140 Holland Park Avenue

JULY 1994

Sat 9 to Sat 16 – An Ecumenical Congress at Gostyń, in a Polish monastery south of Poznan. Details from Mervyn Jackson, 17 Uffington Drive, Bracknell RG12 3HP.

Sat 16 to Sat 23 – The SAT Congress is at Straznice, Southern Moravia, in the Czech Republic. Details from S-ro V. Hasala, Box 34, CZ-969 62 Straznice.

Sat 23 to Sat 30 – The Universal Congress in Seoul, S. Korea. Book through EAB, London, or UEA, Rotterdam.

Sat 30 to Sat 6 – August Conference for teachers and school in Kangnam University, 20 miles south of Seoul. Contact Arnold Pitt, Editor of the Esperanto Teacher, 0568-613061.

AUGUST 1994

Mon 1 to Thurs 11 – A Jamboree for Scouts and Guides near Lake Ijseelmeer, Netherlands, at which Ms Arie Bouman, Driesdreef 8, B-9030 Ghent, hopes to organise Esperanto activities.

Sat 6 to Sat 13 – A Summer-school at Wedgwood Memorial College, Stoke-on-Trent, Staffordshire ST12 9DG. Write to, Dr Tatton at the College.

Tues 16 to Sun 28 – Martin Howard recommends a visit to Kudowa, Poland's Garden of Eden! For details phone 0371-850423.

Sun 21 to Sun (Sept) 11 – The Third African Congress will be in Ghana. Details from UEA, or Sally Phillips 0484-422354.

SEPTEMBER 1994

Fri 2 to Sun 4 – A Scottish weekend in Churches House, Dunblane. Details from Albert Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge EL5 1LE. Tel: 0236-421636.

JANUARY 1995

Fri 27 to Sun 29 – The Quaker Esperanto Society meets Friends again, but in Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent.

**Please send material for
this calendar, before
25th of each month,
to**

**David Featherstone
121 Limpsfield Road
South Croydon CR2 9LF
Tel: (081) 657 7055**

**He prepares advance
information monthly for
federation secretaries**

TRADUKU!

Amiko de la rubriko skribas: 'Mi rimarkas, ke ĉi tiu serio preskaŭ atingis la finon de la alfabeto, kaj mi ja esperas, ke ĝi daŭros post Z'. Tre ĝustatempe alvenas tiu komento, ĉar mi mem komencis starigi la demandon, ĉu daŭrigi au nuligi la rubrikon? Mi estas kontenta pri tiu lia komento, ĉar persone mi ĝuas nian komunan studadon kaj tre malvolonte rezignus pri ĝi. Espereble vi ĉiuj konsentas kun li?

§

Watch. *Rigardu kaj spektu egale validas, kiel ankaŭ observu.*

TV. Strange, la vorto *televido* (kutima uzado de plimulto) ne estas difinita en PIV. Ĝi tamen aperas en la difino de *televizio*: 'Tekniko kaj ĝenerala organizo de la televidado'. En la nunaj tempo kaj kunteksto, ambaŭ formoj verŝajne validas. Feliĉe, jam delonge malaperis eĉ tria alternativo: *televideo!*

Rites of passage. Tiu esprimo aludas al diversaj ceremonioj, kiujn devas travivi adoleskantoj en diversaj komunumoj antaŭ ol esti akceptataj kiel plenkreskuloj. Oni metaforigis tiun ideon por priskribi adoleskulajn kutimojn ankaŭ en nia socio. Tial ŝajnas al mi, ke taŭga traduko de tio estas *inica ritaro*. Alternativoj, kiel *ritoj de pasado* k.s., kvankam laŭvorte ĝustaj, verŝajne ne transdonas komprenon al alilingvanoj, kiuj ja rajtus scivoli: kia pasado? Tamen *maturiĝritoj* (MJ) trafas la ĝustan signifon.

Embark upon. Kvankam laŭvorte tio estas metaforo laŭ la signifo *surŝipiĝi*, verŝajne plej taŭga traduko estas *ekpartopreni*.

Hair. Kvankam *haroj* evidente ĝustas, plaĉis al mi la propono de *frizuroj* (KH). Bedaŭrinde tiu vorto ne troviĝas en PIV. Ĉu do ni parolu pri *frenezecaj frizaĵoj*?

Plausible. Tiu vorto ĉiam enhavas nuancon de suspekto: li ŝajnigas sin kredinda, sed mi ne certas pri tio. Sekve, esp-a traduko starigas malfacilaĵojn. Ĝenerale oni kontentiĝis per *kredeblaj* – sed kie la suspektemo? RH brave tradukis: *ludas tute konvinke sian rolon*. Tamen plej plaĉas al mi *kredigaj* (NI), ĉar ĝi sugestias klopodon de la prezentisto kredigi sin.

Takes on board. *Dungas* (aŭ *engaĝas*, IE). Alie: *surekranigas*.

On marijuana. *Sub influo de mariĥuano. Kanabo* estas la plantaĵo, *mariĥuano* estas la drogo.

Takes the piss out of. Simple *mokaĉas* aŭ *ridindigas*, kvankam ER riskis: *pugigas*.

Authorities. *Instancoj* ŝajnas pli neta ol *aŭtoritatuloj*.

Literacy. Diversaj tradukoj: *alfabetismo, skribkapablo, legpovo, lerninteco* (bela vorto!). Literacy povas esti ĉiu el ili; sed ni prefere demandu al ni: kion precize mokis la prezentisto? Kaj mi opinias, ke ni devas konstati: *klerecon*.

I simply must stop. Plej esperantece: *mi prefere ĉesu* (RH) aŭ *haltu* (IE).

Gone too far. *Troigis* ne kontentigas min, eĉ se ĝi estas pravigebla. Tamen kontrasto inter *troigis* kaj *maltroigis* (RC) estas loga. Pli bona estas *tro ekstremiĝis* (MEG). Plej plaĉas tamen: *mi certe kritikas tro forte* (IE).

Quick flashes. *Ekaj eretoj* (MJ), *fulmbildoj* (IE), *ekfulmoj* (ER), *bril-eksplodoj* (KH).

Subliminal. Kvankam mi persone sentas, ke *subkonsciaj* sufiĉus ĉi tie, tamen la vorto *subliminalaj* troviĝas en PIV kaj ŝajnas uzenda.

Is never questioned. *Neniam pridubas; neniam kontrolas; neniam ekzamenas.* Notu, ke ĉiuj pli sukcesaj tradukintoj elektis (prave) aktivigi la pasivon, kio oftege konvenas en esp-a traduko el la angla.



Premieto al Richard Howard, konsolaj premietoj al Malcolm Jones kaj István Ertl. La suba traduko estas mozaiko.

Spektu porinfanan televidon. Vidu al kia pagana inica ritaro la infanoj nuntempe submetiĝas. Tre junaj prezentistoj kun frenezuleskaj frizaĵoj babiladas senĉese kameraen kaj estas ja tre kredigaj. Iufoje la televido engaĝas oldulĉjon kiu ŝajnigas sin same nematura kiel lia publiko, aspektas simila al Humbert Humbert sub influo de mariĥuano, kaj primokas sin mem, gepatrojn, instancojn, sencon, logikon kaj klerecon. Ĉi-punkte mi prefere haltu: mi certe kritikas tro forte.

Sed ne. Mi ne kritikas sufiĉe forte.

Porinfaneta televido ne informas; ĝi komunikas per fulmbildoj preskaŭ subliminalaj, kaj la informojn, kiuj esprimiĝas, neniam pridubas la faristoj de tiuj ĉi elsendoj.



Bonvolu sendi solvojn de la suba teksto al la redakcia adreso ĝis la 20a de novembro.

T

Worse still, the wind had again and again craftily drawn breath each time Kramer had attempted to light a consoling Lucky, and then puffed out his match at precisely the moment the flame reached the tobacco. And even when, after dozens of tries, he finally managed to get a cigarette alight, the wind still had a trick up its sleeve: it made the tobacco combust so fiercely the whole lot was consumed in a fraction of the time it usually took, leaving a very nasty after-taste.

He'd had words with the sea earlier. It had seemed so huge and unreasonable, poised there behind his back, filled with dark mysteries and horrors,

showing off its immense strength in breakers that boomed above the shriek of the wind, that he had become not at all sure that it would remain much longer below land level, but might decide tonight was the night for a little slap and tickle among the sexier ladies of Jafini, sparing not a thought for the poor bugger it drowned on the beach on its blundering way there.

'So watch it,' he had warned, 'any more of your nonsense, hey, and I'll come and bloody piss in you! – and that'll change you *worldwide*, you hear?'

– James McClure, *The Song Dog*

W.A.

NOT GUILTY

Bonvole ne kulpigu min pro la laborado ĉe la BENDOTEKO! Mi tute ne estas kapabla surpreni tian grandegan taskon!

Tiu mirinda kreaĵo estas la frukto de miriga virino kun nomo Beatrice Clarke. Kun helpo de Bill Walker kaj Miĥaelo Drogosz.

Kiam 'oni' konstatis kiom abundas sona materialo kiun vi membroj povus kaj volus aŭdi se vi scius pri ĝi, ni serĉis kompetentulon por krei tiun kolekton de sonbendoj, kaj por formuli metodojn per kiuj vi povus prunti bendojn laŭvole. Tio estas servo al membroj kiu longe mankis al ni.

Aperis magie Beatrice. Ŝi pasigis milojn da horoj ripete aŭskultante centojn da registroj de prelegoj, deklamoj, instruoj, intervjuoj, kantoj, konversacioj; ŝi selektis, redaktis, kopiis, katalogis, kaj dum pli ol jaro preparis sistemon (kiun nun administras Miĥaelo en la Centro) per kiu vi povos aŭdi la voĉojn de eminentuloj kaj nekonatoj, homojn kun kaj sen renomo, novajn kaj antikvajn. Subite venis al ni *mejloj* da bendomaterialo el la arkivo de Petro Schilperoord sed ... sed grandaj alirapidaj bobenoj, netaŭgaj formatoj. Kiel ebligi uzon de tiu trezoro? Beatrice estis ĝenata.

Aperis magie Bill Walker, kiu ege kompetente transmetis ĉion sur normalajn kasedojn, kun notoj, ebligante redaktadon, kopiadon, kaj fine pruntadon. Beatrice trankviliĝis kaj denove eklaboris. La Bendoteko kreskas kaj ekfunkcias kontentige.

NUN vi povos vian grupan aŭ Federacian kunsidon briligigi per aŭdigo de neripetebaj voĉoj de famuloj kaj familioj; aŭdu la voĉojn de infanoj kaj maljunuloj, sendu 50p en poŝtmarkoj al la Esperanto-Centro kaj ricevu katalogon de THAT BENDOTEKO.

Kaj danku al Beatrice, al Bill, kaj al Miĥaelo.

* * * * *

FINE nun venas alia problemo. Kio okazos se iu perdos kasedon aŭ difektos trezoran voĉon? Ni bezonas kopion de ĉiu valora kasedo. Kaj la kopiado estas temporaba. Kiu povos tion fari? Ĉu vi????? Se jes, skribu al Beatrice tuj, ni petas. Ĝi estas plua valora tasko farenda.

Will Green



NOVAJ LIBROJ

Metropoliteno. Vladimir Varankin (1902–1938).
Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. 262 paĝoj.

Ĉi tiu »forgesita ĉefverko« de la Esperanta literaturo havas malglatan eldonhistorion. Ĝin unue eldonis EKRELO en Amsterdamo en 1933. Pro la politikaj cirkonstancoj kaj la eta eldonkvanto oni tiuepoke ne multe atentis ĝin. Pli bele kompostita kaj presita eldono aperis en 1977 ĉe TK en Kopenhago. Ŝajnas, ke ankaŭ tiufoje la eldonkvanto ne estis tro granda, ĉar dum kelka tempo

ankaŭ la dua eldono estis elĉerpita, kaj de la libroservo de UEA estis mendebla nur ĝia angla traduko (Amsterdamo: TK/Stafeto, 1979). Tiam la eldonoj venis kvazaŭ aŭtobusoj (longe oni atendas, kaj subite venas du samtempe), ĉar en 1992 en Ruslando du eldonejoj sendepende faris »trian eldonon« de la verko: »Progreso« en Moskvo, kaj »Sezonoj« en Jekaterinburgo. Dum la Moskva eldono estas pli fidela al la antaŭaj eldonoj la Jekaterinburga eldono estas lingve reviziita. Ĝi estas ankaŭ malpli multekosta.

»Metropoliteno« uzas interesan miksaĵon da rakontmanieroj. En la unuaj du trionoj de la libro alternas du rakontmanieroj: mi-forma rakonto el la taglibro de Vitalij Zorin, rusa inĝeniero ĵus transloĝiĝinta al Berlino por tie studi la metropolitenkonstruon, kaj li-forma rakonto el la romano, kiun tiu verkas en siaj liberaj horoj. En la unua fadeno ni aŭdas pri la agado de la Berlinaj ruĝfrontbatalantoj, kun kiuj Vitalij kunlaboras, de aprilo 1928 ĝis aprilo 1929, kaj pri la amikiĝo inter Vitalij kaj kamarado Alice Berg. En la dua fadeno ni aŭdas pri la lukto de Vitalij kontraŭ Moskvaj burokratoj por persvadi ilin permesi la konstruadon de subtera fervojo en Moskvo kaj pri la malboniĝantaj rilatoj inter li kaj lia edzino Olga. Ĝis paĝo 168 la romano en la romano atingas la punkton, je kiu Vitalij forlasas Moskvon por veturi al Berlino, kaj la taglibro atingas la punkton, je kiu Vitalij forlasas Berlinon por reveturi al Moskvo. Tie, kun eksplicita averto de la aŭtoro, »kunfluiĝas la pasinto kaj la estanto«, kaj la rakontmaniero ŝanĝiĝas al pli forma rakonto pri la reveno de Vitalij en Sovetunion kaj pri la surstrata batalado, kiu ekiĝas en Berlino post la manifestacioj de la unua de majo. Tamen de paĝo 199 al paĝo 213 ni legas rekte el la taglibro de Alice Berg, de februaro 1929 ĝis aŭgusto 1929, priskribanta el ŝia vidpunkto la forveturon de Vitalij, la surstratajn batalojn, kaj fine ŝian veturon al Moskvo, kie ŝi renkontas lin.

Kiam »Metropoliteno« aperis en 1933 ĝi estis tre aktuala. Hodiaŭ ĝi estas same valora kiel historia dokumento donanta tre vivecan priskribon de tiu

epoko. Alia forta punkto de la romano estas ĝia karakterizado. La karakteroj de Varankin ne estas ŝablonaĵoj.

Ĝenerale la nuna eldoninto faris bonan laboron revizianta la lingvaĵon. La plej ĝenaj »eraroj« estas forigitaj, dum la stilo de la romano ne estas esence ŝanĝita. (»Malpli ol 0.5% de la tekstaj unuoj suferis ŝanĝojn.«) Mi povas ĉikani kelkajn detalojn: Ĉu necesis »korekti« »trockiano« al »trockiisto« kaj »soveta« al »sovetia«? Indis ja korekti la rusisman konstruon »ni kun Alice«, kiam temas pri nur du personoj, sed necesas decidi, ĉu korekti al »mi kun Alice« aŭ »mi kaj Alice«. La frazo »Mi kun Alice estas forveturintaj al li mezutage.« (paĝo 96) estas malbona kompromiso! Ĝenerale tamen la eldoninto bone sukcesis reproksimigi la »rusan dialekton« de Esperanto al la internacia normo. (William Auld priskribas la lingvaĵon de »Metropoliteno« kiel apartenantan al la »laborista skolo«, indikante, ke ne temas pure pri »nacia« variaĵo de Esperanto. Certe kulpas ankaŭ la tiutempa izoliĝo de la sovetuniaj Esperantistoj kaj la iom krizaj cirkonstancoj de la unua eldono. Se Varankin ne estus false akuzita kaj ekzekutita en 1938, certe li estus por la dua eldono mem reviziinta la tekston.)

Edmund Grimley Evans

Faru la kontrolon! Speciala instrumaterialo por perfektigaj kursoj origine verkita de Andreo Cseh; reeldonita de Internacia Esperanto-Instituto en kunlaboro kun Esperanto 100, info-instrua fako de Nederlanda Grupo de Geinstruistoj Esperantaj. 60p. Plus **Solvoj**, 26p.

Kiel gimnaziano en la 60-aj jaroj mi konatiĝis kun la franca per lemolibro *Nos voisins français*, poste kun la germana per *Aufenthalt in Deutschland*. Ambaŭ, laŭ tiamaj kriterioj, meritoplenaj lemolibroj, kun desegnaĵoj, tekstoj, ĉefe gramatikaj klarigoj plus – amase – ekzercoj. Koncerne lingvo-paroladon ... nu, miamemore la parola parto de la mezgrada, t.n. O-nivela ekzameno kontribuis nur 5% al la fina rezulto: do kial tro okupiĝi pri tio?

Bedaŭrinde, leginte *Faru la kontrolon!* mi sentis min rejetita en la ĵus priskribitan teoriumu-sed-ne-tro-parolu-epokon – ja de iu vidpunkto en eĉ pli barbaran. Kial? Simple – la du A4-formataj libretoj (la pli ampleksa kun sinsekvo de Cseh-tekstoj kompletigitaj per pronomoj, prepozicioj, finaĵoj, ktp; la pli svelta kun solvoj) plene ignoras modernan, paroligan situaci-komunikon metodikon.

Nenio kontraŭ Cseh; male: sed akaparo de Cseh-aj »veraj historioj« (ĉu?) por tedaj, tro longaj kompletigaj ekzercoj bagateligas la memoron de elstara pioniro kaj, pro neeviteble mucida enhavo, ridindigas Esperanton. Kiu nuntempe interesiĝas pri velkinta, antaŭmilita socio, en kiu, ekzemple, profesoro, leginte pri »la glora reĝo de nia adorata lando«, senmurmure akceptas, ke lia edzino »preparis la tagmanĝon kaj admonis sian servistinon konduiti antaŭ alia gasto kun deca seriozo« (p.6)?

Monarkismo, patriotismo, eventuale kontraŭfeminismo: neniu hodiaŭa fremd-lingvisto »kun deca seriozo« tiaĵojn al studentoj enmanigas. Kompatinda

Esperanto: kial vi elmetatas al arkaikaĵoj, kiuj, se temas pri la angla, franca, germana, ktp, antaŭ jardekoj estus enmuzeigitaj? Ke kompletigaj ekzercoj ankoraŭ rolon ludas, evidentas: sed kial ne elekti pli aktualajn, pli koncizajn tekstojn?

Nederlanda Grupo de Geinstruistoj Esperantaj malŝparis al si monon kaj tempon, produktante lernolibran ekvivalenton de biplano Tiger Moth. Denove substrekendas, ke nepras en Esperantujo modernaj lernolibroj kongruaj kun tiuj haveblaj por aliaj lingvoj en ĉiuj lernejoj kaj universitatoj. Tiurilate laŭdindas la klopodoj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Resume: ĉu mi en la 90-aj jaroj fiere reeldonus *Nos voisins français aŭ Aufenthalt in Deutschland?* Nepre ne!

Paul Gubbins

Kaj ni solas de Heinz Kahlau. El la germana trad István Ertl. Bellinzona/Budapesto, 1991. 65p.

La tradukinto agnoskas, ke li prezentas al ni verkojn de minora poeto, kiu 'ĉarmas' pro la fakto, ke 'li ne kaŝas sin post arbaro da simboloj kaj lingvaj eksperimentoj'. Kurioze, ke tiu trajto ĉarmas en nacilingva poeto kaj samtempe ofte fariĝas signalo por eligo de recenzistaj ponardoj kiam Esperanta poeto montras ĝin!

Ertl unue legis du verkojn de Kahlau sur la muro de berlina metrostacio. Efektive, tio estas la ĝusta loko por la tuta enhavo de la libro, ne pro la enesto de obscenaĵoj, kiajn oni kutimas vidi tialoke (tiaĵoj tute mankas ĉe Kahlau), sed pro la banaleco de la temoj, la mankoj de enhavo kaj teknikaj rimedoj, kaj pro la fakto, ke multaj poemoj konsistas el deko aŭ malpli da linioj. Tiuj faktoroj kune rezultigas verkojn, kiuj ne entenas sufiĉe por kapti la atenton dum pli ol kelkaj sekundoj da trajno-atendado. Foje troviĝas ĝermo de ideo, sed neniam ĝi estas ellaborita; ĝenerale, tamen, temas pri memevidentaj konstatoj. Foje aperas iu simpla rimoskemo, sed eĉ tiam la lingvaĵo impresas seke kaj proze. Resume, vi trovos nek arton, nek originalecon, nek inspiron en la verkoj de Kahlau.

Iukiale, la germanaj originaloj apudas duonon de la tradukoj. Malica leganto sendube tuj demandus ĉu la malĉeesto de originaloj apud la alia duono signifas tradukistan mankon de memfido en tiuj kazoj. Komparo de la originaloj, kiuj aperas kun la tradukoj montras, ke la tradukoj estas kompetentaj. Eventuale, do, la libro povus esti iuspeca helpilo al lernanto de la germana, kiu scipovas Esperanton, aŭ al germanparolanta lernanto de Esperanto. Al aliaj legantoj ĝi tamen ne rekomendindas.

Krys Ungar

LAŬ MIA OPINIO ...

Klarigo

Mi volas ĝustigi la miskomprenon, kiun mi rimarkas en la recenzo presita en la lasta eldono de BE pri mia tajpita broŝuro 'Lidja Zamenhof'. Bedaŭrinde, mankas informo en la libreto mem pri tio, ke la enhavo estas prelego, kiu okazis dum la skota studrondo en Dublano la 5an de septembro 1992. Ne estas tute vere, ke la libro "estas resumo de la anglalingva libro 'Lidja - Daughter of Esperanto' de Wendy Heller", ĉar nur unu horo por aŭskultigi la aŭdantaron estis je mia dispono.

Tiu plaĉa libro sekvis ĉar D-ro Goodheir afable konsentis kontentigi tiujn aŭdintojn, kiuj petis ĝin skribi, kaj por tiu celaĵo mi tuj transdonis ĝin. Tiukaze mi ne antaŭvidis, ke ĝi atingos vastan legantaron, kio necesigus aldonon de klariga antaŭparolo kaj zorga elsarkado de eraretoj pere de tiutempe pli sperta esperantisto, eble ankaŭ iom da plibonigo, ekzemple du-tri rubrikoj, por la nova celo.

Irene Bennett

Ni ne permesu al tiu homo foriri!

Leginte la troan laŭdon pri MI, mi konstatis ke la verkinto certe estis Will Green. Li transprenis oficiale la taskon de Sekretario de EAB - sed baldaŭ tiu tasko iĝis preskaŭ flank afero! Will transprenis rilatojn kun gazetaro kaj radio, li okazigis diversloke renkontiĝojn pri publiko, li prelegas tie kaj tie pri Esperanto, li verkadas en aro da esperantaj periodaĵoj. El la Centro en Holland Park Avenue li forigis kolektitan rubaĵon de jardekoj - aliaj timis tion fari, "ĉar eble, eble, iu alia serĉos..." Nun estas iom da spaco en la kelo! Ĉu li faradas pli - MULTON! Kaj li en sia hejmo gastigas ĉiumonate la rondon en Mottingham.

I think this was a case of the Green pot calling the kettle white.

Peter Danning

Grammatical Categories

Your answer to correspondent Mr Thomas Wood (BE p.172) concisely covers the main points he raises, but I would like to address further the question of the omission of finals -o and -a.

The great advantage of compulsory 'signpost vowels' at the end of words is that we can easily find our way around the sentence and thus arrive at the correct meaning, whatever (to us) strange word order Esperantists from very different language families choose to use. Indeed, if ever there were a case for making two inflexions compulsory it would be those of the noun and adjective yet the rather badly-named 'naturalistic' languages (I would deny that Esperanto is not naturalistic) do not make this distinction - does Interlingua's *arbore nano* mean 'dwarf tree' or tree dwarf? The context *might* tell you, but on many occasions I have found this type of phrase in Interlingua to be very unclear. With absolutely no consensus between the world's citizens on whether to place the noun or adjective first, the Esperanto solution is pure common sense. Extend the flexionless principle to other parts of speech and what do we get? Precisely that ambiguity which we so often see in newspaper headlines as exemplified by Simeon Potter in *Our Language*: COMMUNISTS FEAR SPLIT GERMANY BLAME.

A second problem arises by omitting vowel inflexions: the rhythmic balance of the sentence can become seriously impaired. (Neo) provided constant examples of how jerky the rhythm becomes when final vowels are dropped and stressed syllables find themselves close

together (I use the grave accent here to show stress): *noy vivôr dān in plèn kontènt nel tån bèl mònd po nòs kreāt* (= ni tiam vivos en plena kontenteco en la tiel bela mondo por ni kreita). If we hear the (Neo) sentence instead of reading it, the too rapid succession of meaningful syllables requires a very alert mind if some of the meaning is not to be lost. I have observed that this also frequently happens in spoken English!

A third problem is that the vowel/consonant balance is shifted in favour of the consonants. Most of the world's languages are not like English or Russian, where groups of consonants can heap up to tongue-tie the foreigner. If we find Russian *zdravij* difficult, what will an Italian think of our *sixth street*? Most languages balance their vowels and consonants at least as well as Esperanto, so the words of a poem in Interlingue – *chastmen gardat* – with their four vowels and ten consonants can be calculated to provide speakers of Chinese, Spanish, Hindi, Arabic, Bengali, Portuguese, Malay, Japanese and French (nine of the world's twelve main languages) with something of a difficulty, to put it mildly.

No, irrespective of what may go in poetry Zamenhof surely got this matter right on all counts, and I would personally prefer any day his *Esperanto havus la avantaĝojn de reguleco kaj neŭtraleco kaj estus facile lernebla* to the version in Mr Wood's own project, *Interling wud haba li avantaĵs ov regularite ed es facil te lerna*. Case proven?

Adrian Pilgrim

I don't know if Thomas Wood's suggestion of dropping the vowel endings of Esperanto words would make it sound like English, but it would certainly make it more difficult to pronounce. Ask the Japanese. Yokohama/heĝo are certainly easier to pronounce than Christchurch/heĝ' – even for an Englishman!

I don't know why people want to

change the simple grammar of Esperanto; it's the style of writers and linguists that makes it more irregular and therefore more difficult.

It was unfortunate that neither Zamenhof nor the early Esperantists thought of making a rule that nouns took priority, followed by transitive verbs, intransitive verbs, adjectives. Zamenhof miswrote 'kombilo' instead of 'kombo', so that it didn't match 'broso', but you would have thought someone would have noticed the irregularity – they were keen enough to suggest silly alterations to the grammar and vocabulary.

It was Cart, for example, that changed the English translation of 'komb' in 'La Fundamento' to a verb so that it became irregular with 'bros'. Therefore, in theory at any rate, you say 'la broso estas farata per broso' but 'la kombo(?) estas farata per kombilo'.

It's the same with 'ferm/i, fermiĝi' but 'bruligi, brul/i', 'bon/a, bone' but 'tuj, tuja'. At least Couturat realised that if roots were neutral you had to use more suffixes.

This is nothing, of course, compared to the other projects – especially Interlingua. I can only assume that people spend their time and money on Interlingua instead of Esperanto for the same reason that people spend their time and money on steam and model railways instead of the real thing, which would give us a first-class transport system as Mr March once said!

Vi produktas bonan revuon. Estas bedaŭrinde, ke ĝi ne povas esti monata revuo.

Charles Field

Following Thomas Wood's reference to *komb-kombilo* but *bros-broso*, I must say that I was similarly puzzled over *fork-forko* but *ŝovel-ŝovelilo*. No one could believe that either was more verbal or substantival than the other. The difference must arise from an unfortunate

historical accident which we have now got to live with. The burden is not excessive.

Norman Ingle

The thing is, English is not the sole criterion. Fork in English can be either substantial or verbal, but in several languages its equivalents are first and foremost substantial which leads to forko. But ŝoveli is purely Germanic, and both English shovel and German schaufel(n) can be either verbal or substantial, with no reason to prefer either. Therefore, the two roots in Esperanto are not exact parallels. – Red.

Esperanto Theatre

When English theatrical companies are invited to perform abroad they can immediately accept. How much of their performances is fully understood by the audiences is another matter, but while they have this ability to perform abroad they are entitled to believe that English is a viable international language.

Last year Brighton and Hove Esperanto Society set up a savings account with a building society under the title 'Esperanto Theatre'. We raise money by fortnightly sales at our local community hall. We sell bric-a-brac, second-hand books, new-to-you clothes, pot plants, jams, marmalade, etc. Sometimes we sell honey supplied by Peacehaven beekeeper Esperantist, Ken Stevens, who helps us at the stall and with transport.

I am not suggesting that others should copy us ... hang on a sec ... Yes, I am! The money will help to PAY FOR PROFESSIONAL help. I am writing this in English the quicker to place it before English-speaking actors willing to learn Esperanto while teaching us theatre. But we must be prepared to PAY the actors and put them up. Why should they work for nothing? Only amateurs work for nothing and the result is amateur performance.

In some regions Esperanto pronunciation is markedly better than in the Home Counties and the Celts, for example, have already proved that they can learn a foreign language, whereas the English admit to mental blockage in this regard. However, the 'resting' and the retired actors are mostly here in Brighton, so we decided to make a start here.

Please do not forget our plea for original plays written in Esperanto.

Karoline Gilmore

Interlingua

In the September-October number of the *Brita Esperantisto*, Rik Dalton has written a lengthy review of my book *Kio estas Interlingua: Informlibro por Esperantistoj*. Unfortunately, he seems to have misunderstood the purpose of the book, calling it a polemic (i.e. a fierce attack) directed against Esperanto. In point of fact it is nothing of the sort. I begin by explaining why a factual, non-controversial presentation is desirable, giving two brief summaries of what to avoid, following this with a short history of the International Auxiliary Language Association of Interlingua itself, based on original documents. The *Konciza gramatiko de Interlingua* occupies pages 9 to 14, a 3000 word Interlingua-Esperanto mini-dictionary occupies pages 15-52 and a similar Esperanto-Interlingua mini-dictionary pages 53-89, followed by a sample page in Interlingua in which I explain the different aims of Esperanto and Interlingua. This includes the word 'schematic' to describe languages such as Esperanto and Ido, a term Rik Dalton seems to find objectionable. However, as I define 'schematic' as 'aiming at great regularity', I do not know why he objects to it. A final three pages give a list of 27 words in nine languages which show the similarities and dissimilarities of Esperanto and Interlingua. The aim of the book is to give the facts

to intelligent adults and let them form their own conclusions. To tell them what to believe would be to treat them as children, the pervasive sin of all authoritarian institutions. I would be pleased if they decide to study and use Interlingua, but have no wish for them to abandon Esperanto. Both languages are tools of communication. Treating them as mutually exclusive cults can only alienate the public and impede the purpose we have in common. If readers of the *Brita Esperantisto* want to check in detail what I have written, they can buy a copy of the book, which costs only £6. If they cannot afford it, no doubt their local Public Library will get it for them.

B.C. Sexton

Instruu al ni Esperanton

'Teach us Esperanto' kriis mia klaso de 13-jaruloj tuj antaŭ la fino de la somera trimestro.

'Certe ne!' mi iom akre respondis. 'Ĉi tio estas leciono pri fiziko.'

La sekvanta semajno tute neatendite vizitis min Cameron Sackey el Ganao. Do mi invitis lin veni al la lernejo kun mi. Estis precize unu semajno post la supra konversacio en fizik-leciono en kiu mi neis al Esperanto, kaj nun estis la fino de la trimestro.

Kia surprizo por la klaso. Mi invitis Cameron instrui Esperanton al ĉi tiu klaso, kaj tion li bonege faris dum pli ol unu horo. Entute dum la tago Cameron instruis al pli ol 60 junuloj en la lernejo.

La junuloj ricevis ege bonan impreson de la lingvo, kaj komencis la paroladon kun bona ne-angla akcento. Ili vidis ke Esperanto vere estas internacia: eĉ nigru-
loj el Afriko uzas ĝin. Dankon Cameron!

Mervyn C. Jackson

Inter-etnaj bataloj

Antaŭnelonge mi aĉetis la novan libron de Spomenka Ŝtimec: *Kroata Milita Notlibro*.

Ĝi estas taŭga legaĵo por tiuj, kiuj tute ne povas kompreni la nunan staton en tiu mondparto. Ĝi pruvas, ke la afero estas egale nekomprenebla por la loĝantaro, kiel ĝi estas por homoj, kiel mi kaj mia edzino, kiuj pasigis multajn vere agrablajn feriojn en Jugoslavio.

La libro estas ne nur informa, kaj tute ne partianeca, sed la etoso estas transdonita per multaj personaj anekdotoj. La verkistino konstruas tutaĵon malpeze, kiel pentristo bildigas scenon per amaso da delikataj tuŝoj.

Mi urĝigas eĉ tiujn, kiuj ne havas multan tempon por legado, aĉeti tiun ĉi facile legeblan libron. Ili komprenos, ke estas malnoblaj politikistoj kaj povserĉantoj, ne la simplaj homoj, kiuj respondecas pri la teruraj bataloj inter-etnaj.

Henry D. Palmer

Vortoj

Unue, temas pri la Krojdonna listo en la artikolo de Douglas Norman – pp.154–155 en la BE, sep/oct, 1993.

En artikolo presita en alilanda gazeto angla verkanto uzis la vorton '*tertuko*' kaj ne ĝin glosis. La subredaktoro interkrampigis post ĝi la vorton '*matraco*'. Sed '*tertuko*' signifas: '*avkorezista tuko, por sternado sur la teron por surkuŝado.*' <Anglalingve – '*a groundsheet*'> Vidu: 'Armea Terminaro – la dua parto de la 1940 Jarlibro de la Internacia Esperanto-Ligo'.

Eble tiu vorto meritas esti en la Krojdonna terminaro litaja. Ĉar infanteria soldato devis sufiĉe ofte dormi sur tertuko en la dua mondmilito. Kaj tiu ja estis danko pro ĝia ŝildo de malseka tero – foje de koto.

'Soldato kiu uzas *tertukon*, poste, ne suferos reŭmatismon.'

Sed ĉu Krojdonanoj povas elpensi pli taŭgan tradukon por 'a *groundsheet*'?

Due, temas pri la recenzita libro – pp.141–142 de la BE julio/aŭgusto, 1993. Tiu libro estas simple aro da 'nov-eletoj' aŭ 'mikro-noveloj'.

Sed, la recenzo estas kurioza pro difino – laŭ la recenzinto – de *Esperanta vorto* per 'jus eldonita vortaro angla! Ni ne scias kion la alilanda verkisto de la 'kovrila reklamteksto' opinios pri tio.

Ankaŭ kurioza en tiu recenzo estas la esprimo '*tradicie ma leganto*'. Se ekzistus tia leganto, li certe estus leganto antaŭjuĝa.

Fakte, ne sufiĉe da noveletoj troviĝas en revuoj kaj gazetoj Esperantaj. Mallonge diri, noveleto povus esti legaĵo distra aŭ saĝiga aŭ edifa – aŭ ĉiuj tri. Kaj se ĝi estas klare verkita de aŭtoro kiu '*pensas en Esperanto*' ĝi estos taŭga legaĵo por Esperantistoj de ia lingva nivelo. Cetere, inter ili povus esti iuj poluritaj gemoj.

Novaj verkemuloj Esperantistaj bonevole konsideru tiun lastan alineon.

Arthur Jackson

Romanio

Mi trovis tre interesa la n-ron 915 (septembro-oktobro 1993) de *La Brita Esperantisto*. Surprizis min la aserto, ke 'certe ne nur la angla sed ankaŭ esperanto devas agnoski la rumanian deziron nomiĝi *Romanio* ekde nun' (p.163). Ŝajne ne sufiĉas la ĝisnunaj landnomaj tiklaĵoj, tial oni devas daŭre krei pli kaj pli da problemoj! Kial forĵeti internacian radikon, cetere zamenhofan, se la rumana esperantistaro mem kiel tuto ne postulas tion? Koreaj kaj eŭskaj esperantistoj preferas, ke ni nomu ilin koreoj kaj eŭskoj. Estu tiel. Laŭ la *Jarlibro 1993* (p.40) eburiaj aŭ aburbordaj samideanoj nomas sian organizon *Kotdivoara Esperanto-Asocio*; nu, en ordo (tamen, ĉu ni nomu ilin kotdivoaroj aŭ kotdivo- aranoj?). Sed kial ŝanĝi vokalon en

vorto, kies formon neniu kontestas?

Krome, ĉu oni nomus la loĝantojn *romanoj aŭ *romanianoj? Se per la unua formo, la vorto *romano* havos kvar aŭ kvin signifojn. Laŭ *PIV* la adjektivo *romana* havas kvinan kaj zamenhofan signifon (romia, latinida) kaj *Romanio* sinonimas la pli oftan *Romio*. Imagu artikolon kun la titolo '*Romano pri romanoj*'. Ĉu de nun ĝi havu 16 aŭ 25 eblajn signifojn jene?:

civitano de Romo

loĝanto de Romo

latinido

eposa proza verko

rumano

pri

civitanoj de Romo

loĝantoj de Romo

latinidoj

eposaj prozaj verkoj

rumanoj

Bone do: ekde hodiaŭ hispanoj iĝu eŝpanjoloj aŭ eŝpananoj, angloj iĝu engloj aŭ ingloj, kaj indianoj iĝu... indoj. Inda propono, ĉu ne? Sed ĉu sufiĉe pripensita?

Aliteme. Al la recenzo de Rik Dalton (p.176–179) mi aldonus mencion pri la verko *Planlingvaj problemoj* de William Gilbert (eld. J. Régulo, Stafeto, 1962), ĉar, kvankam ĝi ĉefe komparas esperanton kun Occidental, ĝi dediĉas ne malmultajn paĝojn ankaŭ al Interlingua (de IALA). Mi krome supozas, ke la libro estas nun kaj plu aĉetebla ĉe UEA.

Georgo Kamaĉo

Tempo fuĝas

En Radio kaj Socio, BE Julio/Aŭgusto, Jack Cox plendas pri la re-nomo de GMT kiel UTC. Fakte ne estas re-nomo sed temas pri du apartaj sistemoj kvankam al la ordinara publiko ili ŝajnas esti samaj. Por detala priskribo oni legu detale en la biblioteko sub la temoj,

Time. Universal Time. Atomic Clocks.

Mallonge GMT aŭ Grenviĉa Tempo dependas de la rotaciado de la terglobo kio GRADE SED NE REGULE MALRAPIDAS dum Universala Tempo (UTC) dependas de la mezo de pluraj atomaj horloĝoj kaj estas la sola scienca tempo rekonita de ĉiuj landoj kaj radiostacioj en la mondo.

GMT estas astronomia tempo daŭre uzata de ĉiuj aviadiloj kaj ŝipoj por navigado kaj unu-dufoje ĉiujare oni aldonas unu sekundon al UTC por ke la du sistemoj ne malsamu pli ol 0.9 sekundo kaj oni antaŭe avertas ĉiujn aŭtoritatojn pri tio, sed la daton de tiu aldono oni ne povas antaŭdiri pli ol iujn monatojn antaŭe.

Tomaso J. Woodall

Blumarkoj

Ricevinte mian ekzempleron de BE N-ro 915, mi ĝojis vidi la anoncon pri la ebleco mendi blumarkojn de la Oficejo.

Nun, por ke la afero ne fiasku, ni mendu ilin kaj uzu ilin ĉiam, kiam ni skribas eksterlanden per aerpoŝto. Tio kompreneble inkluzivas ĉiujn kutimajn poŝtaĵojn por Eŭropo. Se ni ne mendos la etiketojn, ili restos sur breto aŭ en tirkesto en la oficejo ne-uzitaj.

Mi jam skribis al mia eŭropa parlamentano por sugesti la uzadon de tia blumarko kun Esperanto krom la naci-lingva traduko, se dezirata, kaj la Franca (kiu nuntempe estas deviga laŭ internacia interkonsento). Tio estus unua paŝo al harmonizado kaj, oni esperas, al la fina uzado nur de Esperanto. Kial ne skribi same al via MEP?

Henry D. Palmer

La unua eldono de la blumarkoj estas jam disvendita, kaj ni negocas pri baldaŭa reeldono. – Red.

No bona mateno, Majstro

La lingva noteto de S-ro Grimley Evans pri akuzativo kuraĝigas min skribi pri lingva eksperimento (ne jam propono) kiun mi faras de tempo al tempo.

Tiu estas la enkonduko de 'no' kiel akuzativa prepozicio krom la nuna uzo de '-n' kiel akuzativa postpozicio. Proponi no nova prepozicio (kiel ekzemple 'far') ne estas reformo aŭ io kontraŭfundamenta sed nur permesita neologismo kiu aŭ iĝos parto de la lingvo aŭ ne. Tiu nova prepozicio estus tute Zamenhofeca. Krom por la akuzativo D-ro Zamenhof uzis prepoziciojn anstataŭ la fleksiaĵoj de la Latina lingvo, do mi nur konsekvence sekvas no lia metodo. Kompreneble akuzativa prepozicio ŝanĝus no nenio en la Fundamento kaj nek lezus no la koncepto de libera vortordo nek enkondukus no la stulta 'laŭvola akuzativo'.

Rimarku, ke ĉiam la akuzativo estus formata per '-n' aŭ 'no'. Ellasante no la nova prepozicio oni ĉiam devus kompreneble uzi la postpozician formon kiel ĉe la aliaj prepozicioj do la Fundamenta formo restus por ĉiam bona sed unu el la konstantaj plendoj de niaj kritikantoj devus malaperi kaj ĉiuj el la ĝisnunaj problemoj de la akuzativo estus facile solvitaj aŭ solveblaj.

Ekzemple la citita frazo povus esti:

Tiu grava perdo frapis no Zamenhof.

Kaj konsideru la frazon:-

Mi legas no 'La Brita Esperantisto'

Diri

Mi legas 'La Brita Esperantisto'

sonas kiel eraro kiel sonas:-

Mi legas 'La Brita Esperantisto'n

aŭ

Mi legas 'La Brita'n 'Esperantisto'n.

Mi hezitus korekti no S-ro Grimley Evans pri 'demandi' sed ĉu oni ne povas 'demandi informojn' kiam tio signifas 'demandi pri informoj'? Eble stile malbela sed gramatike korekta!

R. Doso

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITIO

OFFICIAL NOTICES

PRESIDENT: Stephen Thompson
 HON. SECRETARY: Will Green, LBEA
 HON. TREASURER: Norah Brown
 HON. LIBRARIAN: G. King

CENTRAL OFFICE: 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF.

Tel: 071-727 7821

Hours: Monday to Friday, 9.30 am to 6.00 pm

DONATIONS

MAY, JUNE & JULY 1993

BEA: Under £5 total £1.75; Anon £5.00; A Irvine £6.25; F Dunbar £10.00;
 G Novello £18.00

EAB: Under £5 total £25.62; Anon £500.00; E Walker £96.00;
 L & J McDonald £12.00; D Sinclair £11.00; J Ashford £10.00;
 A Leslie £10.00; J Whitcomb; £10.00; E & M Fowden £9.00;
 M Giacometti £9.00; J Haigh £7.00; N Harrison £6.00; O Rossetti £6.00;
 J Baxter £6.00; R. Ashford £6.00; K Kronglejš £6.00; H Verkade £6.00;
 J Etherington £6.00; E Blythe £6.00

J. Brownlee African Fund: Anon £500.00

AUGUST-SEPTEMBER 1993

BEA: Under £5 total £6.50

EAB: Under £5 total £8.97; H Schmidt £5.00; M Fielding £5.00;
 B C Davies £6.00; E C Bailey £6.00; W Walker £8.32;
 Danuta kaj Ewa £10.00; D Withey £10.00; Give as you earn £12.48;
 G Hammerton £14.00; M.S. Oliver £15.00; R Thresher £16.00

EAB NEW MEMBERS

R Exley, York ● P Farey, Bristol ● M Farrell, Dublin ● M Hazell, Maidenhead
 R Heath, Croydon ● P Joseph, Richmond ● J Kempster, Bradford
 M March, Crook ● R Poultney, Stoke-on-Trent ● N Robinson, Stevenage
 D Shinn, Chelmsford ● R Sinclair, Didcot ● R Threadgold, Braintree
 A Williams, London ● J Williams, Potters Bar

EXAMINATION SUCCESSES

Intermediate:	† Barbara Rothwell	Helsby, Warrington, Cheshire
Diploma:	† Sue J Ralph	Grimsby, South Humberside
	John T Sproule	Toronto, Ontario, Canada
Licentiate:	† Timothy B Carr	Crewe, Cheshire

† = Distinction

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITIO

Dum la jarkunsido de EAB en Richmond, membroj voĉdonos por komitato de la Administra Komitato. Ĉiuj funkciuloj retiriĝas ĉiujare. La nuna Honorofica Sekretario demisios fine de la nuna deĵorperiodo. Viajn proponojn bonvolu sendi antaŭ la 31a de januaro 1994 al la Honorofica Sekretario de EAB, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF. Li provizos liston pri kandidatoj kaj proponantoj kun la tagordo de la jarkunsido.

Gravaj atentigoj:

1. Proponantoj kaj kandidatoj nepre estadu membroj de EAB.
2. Proponoj nepre estu skribaj de du homoj, kaj nepre inkluzivu la skriban konsenton de la kandidato.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INCORPORATED) LIMITED

Any three members may, by nomination in writing sent to the General Secretary in January, propose any other member (with his or her consent) as a director for the next ensuing period. At the Annual General Meeting in 1994, one-third of the directors will retire from office. A retiring director is eligible for re-election.

Martyn McClelland, General Secretary

GOODS WITH INVOICES FOR PAYMENT

To improve the cash flow problem, we must regrettably ask all customers who telephone their orders but do not have an account at BEA, to please send in a written order with the appropriate payment. Where in doubt about prices or availability, details may be confirmed by phone before ordering. Thank you for your co-operation.

Martyn McClelland

Okaze de la festotagoj

La Ĝenerala Sekretario, la Administrantoj
kaj la Redaktoro deziras al ĉiuj membroj
feliĉon kaj prosperon

A N O N C E T O J

10p por ĉiu vorto — Minime 20 vortoj.
Antaŭpagenda


Min trafis rara malsano, lingvomanio. Mi serĉas kontaktojn kun aliaj suferantoj por interŝanĝi ideojn, opiniojn. Mi interesiĝas pri la gramatiko de Esperanto kaj pri la eblo uzi la lingvon kiel ĉiutagan komunikilon. Mi estas 44-jara anglo, 30-jara Esperantisto. Richard Howard, 15 Blackberry Lane, Northampton NN4 8QU, Anglujo.

Tri Tutmondaj Proponoj. Bonega 14-paĝa, senpaga libreto kun ĉi tiu titolo estas havebla de Sro Jesuo Raposo Montero, Bachiller 2, E-46010 Valencia, Hispanujo.

A World Language for One World, by John Roberts, Association of World Federalists, Preface by Dr John Wells, President UEA. £2, or £2.50 post-free. Take 10 to sell: £12 post-free. Quantity quotes for Esperanto and other groups – write to: AWF, 19 White Horses Way, Littlehampton BN17 6NH.

Ĉu vi konas FONTOn?

Jam de 13 jaroj aperis tiu revuo 12-foje jare kun noveloj, poemoj kaj literaturaj eseoj, originalaj kaj tradukitaj, el la tuta esperantista mondo. Ĝi devus esti nemalhavebla de ĉiu esperantisto, kiu interesiĝas pri nia literaturo kaj nia kulturo. Bele presita sur bonkvalita papero, tiu ĉi lumturo de nia movado meritas vian subtenon. Jarabono por 12 numeroj kostas £12.00.



Ĉefredaktoro: Gerrit Berveling.


Eldonisto: Gersi Alfredo Bays.

Caixa Postal 49,

BR-89801-970 Chapecó-SC, Brazilo.



Over 50.000 references

*A comprehensive new dictionary
of modern Esperanto and English
for practical study and reference*



**THE GREATEST ENGLISH-ESPERANTO
DICTIONARY**

Mendu de la Esperanto-Centro po 9.75 (inkluzive afrankon)



Lazaro

Okaze de la florkrona ceremonio ĉe
'Verda Stelo' en Stoke-on-Trent, aŭgusto 1993

Georgo Kamaĉo

Silenta knabo bjalistoka.
Pavimo de l' malnova urbo.
Rabenoj. Ludoj. Siluetoj.
Vendejo-ŝildoj en frakturoj.
La caro foras. La cigaroj
ekpendas ĉe la lip-angulo.
Knabina rido blanke tanĝas
la dolĉajn revojn de junulo.
La knabo atenteme gapas
al ĉiutagaj strat-tumultoj
inter figuroj divers-gentaj
ade vivantaj en diskuno.
Li paŝas mute, inkognite
salutas polon, judon, ruson
kun naskiĝanta ekkonscio
ke novan lingvon li konstruos.
La noktajn horojn li marodas
por zorga lingv-arĥitekturo
kiun li kovas malmiope
por ŝanĝi noven la futuron.
Li ne imagas, ke ĉi tiel
ne li postvivos, sed Fremdulo

kun liaj nomoj kaj vizaĝo
pri kiu oni kreos kulton.
Mesia, dia Li fariĝos
en aliulaj mis-okuloj,
ĝis oni plene malmemoros
ke Li naskiĝis per uzurpo,
en tiu tago, kiam Oni
decidis murdi la junulon,
en tiu tago, kiam fine
ĉi Majstro murdos sian junon.
Ĉu io restos el la knabo
fumanta kiel kamen-tubo?
Ĉu el la vera viv-miraklo
nenio restos, nula spuro?
Ĉu oni do forgesos, ke
li estis lingvo-maniulo
kun malmodela elparolo
sed imitinda verk-fakulto?
Adiaŭ do, adoleskanto
sonĝanta kun ingvena juko
pri bele ruĝaj tri knabinoj
kun la pur-puro de volupto.

